

1975 junio

68-a jaro

n-ro 834 (6)

aperas monate (escepte de aŭgusto)

esperanto

NE ISSN 0014-0635

universala esperanto-asocio (en konsultaj rilatoj kun unesko)
nieuwe binnenweg 176 — rotterdam-3002 — nederlando

Islando gastigos la 62an UK en 1977



Vi trovos

Sur la paĝo 115, en la kongresa komuniko, preskaŭ perdita inter la aliaj novaĵoj, aperas la lastmomente ricevita ĉefinformo de ĉi tiu numero: La ĝenerala direktoro de Unesko sendis specialan mesaĝon al la 60a Universala Kongreso en Kopenhago. Kvankam vi en la julia/aŭgusta numero de nia revuo legos la kompletan tekston de tiu mesaĝo, bonvole notu jam nun, ke tiu bela gesto de la ĉeffunkciulo de la monda organizaĵo okazas unuafoje en la 20-jara historio de la konsultaj rilatoj inter UEA kaj Unesko. Klopodu jam nun konsideri tiun mesaĝon kiel fizikan pruvon, ke kun la kontinueco de la ĝenerala linio de UEA okazis nenio simila al la asertoj de sarlandaj epigonoj kaj profitemuloj, kiuj lastatempe faras enormajn streĉojn por — helpe de ĝia inventinto — devaluti la daŭre aktualan sloganon "Unueco estas forto". Sed, tio ĉi estas festa numero de nia revuo, kies unua numero aperis antaŭ 70 jaroj, kaj — ni lasu la sarlandajn subfosaĵojn kaj malicaĵojn por nia sekvanta numero. Ĝuu la numeron!

Enhavo

- 101 Varbado de novaj membroj: Pri la membraro en la jaro 1974 (sm), Por havi pli da membroj
- 102 Aldona elekto de komitatanoj B: Markarian, Tyynelä, Jansen kaj Kolker
- 103 La sepdeka datreveno de nia revuo: Berthelot, la fondinto (Marcel Delcourt kaj Jean Amoureux)
- 105 Institucio Hodler 68: En kvin jaroj 33 000 guldenoj
- 106 La 27a Kongreso de IFEF: Kongreso kun faka akcento, Lerneja agado en Francio: Esperanto en lerneja programo?
- 107 Interlingvistiko en Soveta Unio: Sciencaj esploroj kiel bazo por postaj paŝoj, Utilaj kontaktoj
- 108 30 programitaj kursoj por Hindujo: Sufiĉas havi bonan volon, Internacia Esperanto-Instituto: Denove vige
- 109 Post du jaroj, Universala Kongreso en Reykjavík: Islando — surprizalando (Baldur Ragnarsson)
- 112 Jubileo de la ĉeĥa poeto S.K. Neumann: Kunfondinto de la Klubo en Prago, Printempa anonciacio (poemo de S.K. Neumann)
- 113 Recenzoj ("Anni kaj Montmartre", "La stranga butikoj", "Verdkata testamento", "Malbona lupo reenkarniĝinta", "Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko", "Systematikken i esperanto"), Laste aperis . . .
- 115 Kongresa komuniko: Novaĵoj pri la 60a Universala Kongreso
- 116 TEJO-paĝo: TEJO kaj Unesko, Kio okazis kun "Kontakto"? , Interpretistoj
- 117 Loke — Fake — Persone (mallongaj novaĵoj)
- 119 Oficiala informilo, Aĉetebila impona biblioteko
- 120 Anoncetoj

La kovrilo

Kiam temas pri lando, kiu, rigardata sur mondmapoj, similas al forgesita "floso", ie en la vasta nordo de la Atlanta Oceano, oni malfacile imagas, ke tia lando abundas je vulkanoj, gejseroj kaj majeste pompaj akvofaloj. En sia tuteco neordinara kaj laŭ ĉiuj turismaj kriterioj escepta travivaĵo, tiu lando de fajro kaj glacio — Islando — gastigos la 62an Universalan Kongreson de Esperanto en la jaro 1977, elektojaro por la organoj de UEA. Sur la paĝoj 109–111 de ĉi tiu numero, la esceptan landon prezentas escepta poeto — Baldur Ragnarsson, kiu jam prezidas la LKK de la 62a UK.

esperanto

Oficiala organo de Universala Esperanto-Asocio, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Telefono: (010) 36 15 39.

Telegramadreso:

ESPERANTO ROTTERDAM.

Fondita en 1905 de Marcel Paul Berthelot (1881-1910).

Redaktoro: Simo Milojević.

Aperas monate (escepte de aŭgusto).

Abonprezo por unu kalendara jaro: 37,50 gld. (kun membreco kaj Jarlibro 50,— gld.) Unuopa ekzemplero 3,— gld. Por jara aerpoŝto aldonu: Oceanio 16,50; Sudameriko 13,75; Suda Afriko, Azio 11,—; Meza kaj Norda Ameriko, Mezoriento, Meza kaj Norda Afriko 8,25 gld.

Anonctarifo: 1p. 375 gld.; 1/2p. 200 gld.; 1/4p. 110 gld.; 1/8p. 65 gld.; 1/16p. 40 gld. Ripetrabato 20%

Banko: Bank Mees & Hope, Cool-singel 93, Rotterdam-3002 (konto n-ro 25.52.89.804).

Poŝta ĝirkonto: 37 89 64 (UEA).

Estraro de UEA

Prezidanto kaj estrarano pri eksteraj rilatoj kaj kulturo: D-ro H.R. Tonkin, 35 Violet Lane, Lansdowne Pa. 19050, Usono; tel. (215) CL9-8821.

Vicprezidanto kaj estrarano pri landa kaj regiona agado: D-ro W. Bormann, Schärstr. 26, D-205 Hamburg 80, FRG; tel. (040) 7384508.

Vicprezidanto kaj estrarano pri faka agado: Prof. d-ro C. Støp-Bowitz, Camilla Colletts vei 3, Oslo 2, Norvegio; tel. (472) 448085.

Ĝenerala sekretario kaj estrarano pri administrado, komerco, industrio kaj diskonigo de la agado de UEA: E.L.M. Wensing, Dennenstr. 9, B-3581 Achel, Belgio; tel. (011) 643150.

Estrarano pri la delegita reto, rilatoj kun Esperanto-organizaĵoj kaj pri specialaj agadoj: D-ro P. Denoël, rue Victor Raskin 20, B-4000 Liège, Belgio; tel. (041) 270079.

Estrarano pri kongresoj kaj konferencoj: D-rino F. Szabó-Felső, Várady A. út. 4, H-7621 Pécs, Hungario; tel. (072) 16725.

Estrarano pri informado kaj turismo: S. Świstak, ul. Raławicka 10m 11, PL-30-075 Kraków, Pollando.

Estrarano pri financo: E.J. Woessink, Onder de Beumkes 29, Velp-6200, Nederlando; tel. (08302) 7412.

Pri la membraro en la jaro 1974

LA MEMBRO-KATEGORIO, kiu dum la tuta historio de UEA ludis esencan rolon en la financa stabileco de la Asocio, estis la individuaj membroj. De jaro al jaro, la nombro de la individuaj membroj estis kaj ankaŭ plue restas la baza indikilo pri la ĝenerala forto de UEA. Estas pro tio pli ol kompreneble, ke la malkresko de la individua membraro dum la jaro 1974 (v. la martan numeron de nia revuo, p.59) fariĝis unu el la plej grandaj zorgoj de la Estraro de UEA.

Se oni rerigardas la statistikaĵojn pri la nombro de la individuaj membroj dum la lastaj dudek jaroj, oni venas nur al unu klara konkludo — tiu nombro apenaŭ ŝanĝiĝas, ĝi stagnas: En la jaro 1954 UEA havis 6 103 individuajn membrojn, kaj la jaro 1974 finiĝis kun 6 543 kotizintoj en tiu membro-kategorio. Siajn rekordojn ĉi-rilate la Asocio kutime notadis en la jaroj en kiuj la Universalaj Kongresoj okazis en la Orienta Eŭropo, ĉar por tiuj jaroj pluraj centoj da orienteŭropanoj povis pagi la individuajn UEA-kotizojn en sia nacia valuto. Kiam temas pri statistiko, tiuj jaroj (1959, 1963, 1966) kreas apartan konfuzon, ĉar ili kondukas al falsa konkludo, ke la nombro de individuaj membroj ne stagnas.

En la Centra Oficejo de UEA, de kie venas la statistikaĵoj pri kiuj ni ĉi tie parolas, oni povas konstati ankaŭ aferojn, kiuj tute ne vidiĝas el la publikigataj nombroj. Ekzemple, en la C.O. oni ankaŭ rilate la membraron uzas la esprimojn "nete" kaj "malnete". La nombroj publikigataj ĉiujare estas la t.n. "netaj" indikoj pri la membronombro. Parolante pli klare, ni diru, ke tiu "neteco" baziĝas sur la fakto, ke ĉiujare la Asocion forlasas proksimume 1 000 malnovaj membroj (aŭ almenaŭ membroj en la antaŭa jaro), sed samtempe al la Asocio aliĝas ĉ. 1 000 novaj membroj. En la statistikaĵoj, tamen, oni montras nur la "netan" diferencon inter tiuj, kiuj ne rekotizis kaj tiuj, kiuj pagis la kotizon kiel novaj membroj. Ĉi tiu fluktuado de novaj kaj malnovaj membroj estas interesa kaj kuraĝiga el alia vidpunkto, ĉar ĝi atestas pri daŭra refreŝiĝo de la membraro. Sed, ni revenu al la pasinta jaro kaj ĝia falo en la nombro de la individuaj membroj.

Estas almenaŭ kurioze, ke kelkiuj klopodas ligi la maltan membronombro en la fino de 1974 al la ŝanĝoj en la gvidantaro de la Asocio, kiuj okazis dum la Hamburga Kongreso. Kompare kun la jaro 1973, la membronombro falis en 1974 je proksimume 700 membroj. Atribui nun tiun membrafalon al la foriro de la antaŭaj gvidantoj — kaj tion oni volas — estus same sence kaj same infanece, kiel, se oni nun klopodus ligi la membrafalon en 1964 al la tiama elekto de tiuj, kiuj en Hamburgo forlasis la gvidadon de la

Asocio. Efektive, en 1963 UEA havis 7 440 individuajn membrojn, kompare kun 7 139 en la elekto jaro 1964, kio estis falo de 301 membroj. Ĉu ankaŭ tio kaj tiam okazis pro la elekto de la novaj Estraro kaj prezidanto de UEA? Kompreneble, ke ne temis pri tio kaj tiaspeca rezonado restas pura infanaĵo. Aŭ, eblas ankaŭ alimaniere kontesti la ligitecon inter la membrafalo kaj elekto de la nova gvidantaro en Hamburgo: Fine de julio pasintjare (en la C.O. oni faras ankaŭ monatajn superrigardojn pri la pagitaj kotizoj), UEA havis 6 264 individuajn membrojn, kio ja estis je ĉ. 200 membroj pli granda falo, ol en la jarfino. Ĉu oni konkludu, ke la kresko de la membraro de la Hamburga Kongreso ĝis la jarfino ŝuldiĝas al la belaj vizaĝoj de la novaj gvidantoj? Tia konkludo estus nur unu plia arbitra sencecaĵo.

Kiel sola akceptebla klarigo pri la membrafalo en la jaro 1974 restas la fakto, ke la membrakotizoj de UEA altiĝis de 1973 al 1974 je plenaj 33%. Ĉar la kotizoj denove altiĝis ĉi-jare, oni povas atendi novan falon de la nombro de individuaj membroj, sendepende de tio ĉu ni ŝanĝos aŭ konservos la nunan gvidantaron de la Asocio.

Tamen, la membronombro povus pozitive influi io alia, — amasa partopreno en la konkurso, kies regularo aperas ĉi-sube.

sm

Por havi pli da membroj

LA INTERNACIA Esperanto-Instituto (IEI) en Hago (v. apartan artikolon pri ĝi aliloke en ĉi tiu numero) donis al UEA eblecon fari konkurson en la varbado de novaj individuaj membroj por la jaro 1976, kun belaj premioj, donitaj de IEI, ĝis entute 1 000 guldenoj.

La procedo kaj kondiĉoj de la konkurso estas jenaj:

- 1. Periodo:** La konkurso daŭru ekde nun ĝis la limdato — la 30a de aprilo 1976. Por la konkurso estos nombritaj la varbitaj novaj membroj, kies kotizoj atingos la Centran Oficejon de UEA antaŭ la limdato.
- 2. Kvalifiko:** La konkurson povas partopreni ĉiu Esperanto-grupo: urba, vilaĝa, lerneja, kursa ktp. La konkurso do estu afero de grupa kunlaboro.
- 3. Partopreno de kluboj:** Kluboj, kiuj intencas partopreni, petu de la Centra Oficejo de UEA formularon. Sur tiu formularo estu notitaj la nomo de la klubo kaj la priskriboj de la dum la varba periodo nove varbitaj membroj, t.e. nomoj, adresoj, kategorioj de membreco, manieroj de pago ktp. Tiu listo devas esti resendita tiel, ke ĝi atingu la Centran Oficejon de UEA antaŭ la fino de aprilo 1976.
- 4. Difino de varbito:** Nove varbita individua membro por la jaro 1976 devas esti persono, kiu ne estis individua membro en 1973, 1974 kaj/aŭ 1975.
- 5. Membrigo de varbitoj:** La nomoj kaj kotizoj de varbitaj individuaj membroj estu laŭ kutima vojo (ĝenera-

le pere de la ĉefdelegito aŭ kotizperanto) transsenditaj al la Centra Oficejo de UEA.

6. Membro-kategorioj: Ĝenerale, la varbitaj novaj individuaj membroj estu membroj-abonantoj (MA), sed eblas varbi ankaŭ membrojn por aliaj kategorioj. Pri la kategorioj kaj kotizoj vidu paĝojn 22 ĝis 26 en la Jarlibro 1975, aŭ la paĝon 179 de la pasintjara oktobra numero de *Esperanto*.

En la konkurso, varbita MA estos kalkulita je 50 poentoj, MJ je 25, MS (Societo Zamenhof) je 150, DM je 1 000 poentoj ktp., tio signifas, ke la poentoj estas egalaj al la kotizoj en guldenoj por la jaro 1975.

7. Raporto: Kune kun la resendo de la listo (v. sub 3) la klubo bonvolu sendi raporton pri la farita varba laboro, pri la uzita metodo kaj pri eventualaj interesaj spertoj. Ĝi en tiu raporto informu pri la membro-nombro de la klubo, la grandeco de la vilaĝo, urbo aŭ regiono en kiu ĝi laboras (proksimuma nombro de la loĝantaro).

8. Premioj: Estas unu ĉefpremio en la alteco de 500 guldenoj, dua premio de 200 guldenoj, tria premio de 100 guldenoj kaj kvar premioj de po 50 guldenoj. La gajnita premio tamen ne povas havi plian valoron ol trionon de la kotizoj pagitaj de la novaj individuaj membroj.

9. Prijuĝo: Juĝon pri la premioj faros komisiono, starigita de la Estraro de UEA. Tiu komisiono ne sole nombros la gajnitajn poentojn, sed ankaŭ konsideros la de la grupoj senditajn raportojn, el kiuj montriĝas la cirkonstancoj de la grupoj, iliaj ideoj kaj persisto. La proklamo de la premioj okazos dum la 61a Universala Kongreso de Esperanto en Ateno kaj ĝi estos publikigita en la sekvontjara septembra numero de *Esperanto*.

Grupoj povas jam nun ekaktivi rilate la partoprenon en la konkurso, kies celo estas ne nur plialtigi la nombron de la individuaj membroj de UEA sed ankaŭ porti avantaĝojn al la grupoj mem. Krome, la Estraro de UEA atendas, ke la konkurso liveros imitindajn ideojn kaj metodojn por membro-varbado, utiligeblajn ankaŭ por aliaj grupoj en la estonteco.

Ĉiu grupo povos mem decidi kiel ĝi uzos eventuale gajnotan premion, ekz. por kompletigi la grupan bibliotekon, sed oni povos ankaŭ dividi la gajnitajn premiojn inter la membraro de la grupo, ekz. per interna konkurso.

Ni kalkulas pri la partopreno de multaj grupoj, kiuj tiel pretas ne nur helpi al UEA, sed fari organizitan laboron, kiu plifortigos ankaŭ ilian propran bazon. La konkurso estas afero de komuna laboro por komuna celo.

ALDONA ELEKTO DE KOMITATANOJ B:

**Markarian,
Tyynelä,
Jansen kaj
Kolker**

LAŬ LA ANONCOJ en nia revuo (novembro 1974, p. 199 kaj marto 1975, p.58), meze de aprilo 1975 estis dissenditaj voĉdoniloj por la aldona elekto de kvar komitatanoj B de UEA. Konforme al la artikolo 28 (ĉ) de la Ĝenerala Regularo de UEA, la 15an de junio 1975, aparta komisiono, nomita de la Estraro de UEA (s-roj M. Christoffersen, S. Milojević kaj A.W. Treurniet), kaj la direktoro de la Centra Oficejo nombris la voĉojn, kiuj venis antaŭ la publikigita limdato. La komisiono konstatis, ke entute estis ricevitaj 565 voĉdoniloj, el entute 1 198 dissenditaj al la delegitoj kaj la ĉefdelegitoj. El tiuj 565, du voĉdoniloj estis nevalidaj, ĉar la delegitoj voĉdonis por pli ol 4 kandidatoj. Restas 563 voĉdoniloj po 4 voĉoj, kiuj estis jene dividitaj:

Markarian, Raif	424 voĉoj
Tyynelä, Terttu	377 voĉoj
Jansen, Wim	362 voĉoj
Kolker, Boris	336 voĉoj
Maertens, Grégoire	303 voĉoj
Klunder, Helmut	202 voĉoj
Kesälä, Heta	188 voĉoj
Neasignitaj (neuzitaj) voĉoj	60 voĉoj

ENTUTE (563 voĉdoniloj po 4 voĉoj): 2252 voĉoj
Sekve, kiel novaj komitatanoj B de UEA estas elektitaj: s-ro Raif Markarian (Britio), s-ino Terttu Tyynelä (Finnlando), s-ro Wim Jansen (Nederlando) kaj s-ro Boris Kolker (Soveta Unio). Ilia mandato komenciĝis tuj post la elekto kaj daŭros ĝis la unua kunsido de la Komitato de UEA en la sekvanta elektojaro, t.e. ĝis la 62a Universala Kongreso de Esperanto en Reykjavík en la jaro 1977.

Laŭ la nombroj de la dissenditaj kaj ĝustatempe resenditaj voĉdoniloj (kelkdeko venis post la limdato kaj, kompreneble, ne estis kalkulita), plej multaj voĉdoniloj venis el Francio, kie 70 delegitoj (49%) uzis sian voĉdonan rajton. Sekvas Britio kun 54 voĉdoniloj (55%), FR Germanio 48 voĉdoniloj (49%), Usono 37 (34%), Nederlando 31 (51%), Finnlando 26 (50%), Svedio 25 (38%), Italio 22 (35%), Ĉeĥoslovakio 20 (33%), Hungario 17 (100%); poste viciĝas: Svislando 16, Hispanio 16, Brazilo 15, Jugoslavio 15, Pollando 14, Japanio 13, Belgio 12, Bulgario 10, Soveta Unio 10 kaj aliaj landoj kun malpli ol dek voĉdonintoj.



Berthelot, la fondinto

La 18an de junio 1905 aperis la unua numero de nia revuo. Okaze de la sepdeka datreveno kaj helpe de ĵusaj interesaj malkovroj, ni omaĝas la fondinton de la revuo Paul Berthelot (1881-1910). La verkintoj de ĉi tiu artikolo aparte dankas al Pastro Audrin, 96-jara dominikano, neesperantisto, kies rememoroj pri la tempo kiam li estis katolika misiisto en Brazilo malkovris plurajn ĝis nun nekonatajn faktojn pri la fondinto de nia revuo.

MALLONGA sed kompleksa kaj riĉa je paradoksoj estis la vivo de Paul Berthelot. Li estis eksterleĝa filo de Paul Bert (1833-1886), fama scienculo kaj politikisto, iama franca ministro pri publika instruado. Sed, kiam Paul Berthelot naskiĝis, la 26an de julio 1881, en Auxerre (Francio), la loka bakisto Paul Berthelot — do samnoma — deklaris lin sia laŭleĝa filo. La knabeto ricevis la antaŭnomojn Paul kaj Marcel, el kiuj li poste la unuan uzis kiel voknomon, kaj la duan en sia pseŭdonimo Marcelo Verema.

Berthelot iam konfesis, ke dum tuta sia vivo li provis sin difini, daŭre serĉante sian vojon, neniam bone sin sentante en sia propra haŭto. Diversaj ideologioj kaj filozofioj forte altiris lin: spiritismo, determinismo, socialismo kaj fine anarkismo. Flame kaj idealiste li ĉiam defendis siajn opiniojn (ilin metante super ĉio): "La esprimo sincera de miaj ideoj estas al mi pli kara ol ia ajn konsidero".¹⁾

Fine de 1903 li venis al la urbeto Céret, je kelkaj kilometroj de Perpignan, ĉe la hispana limo. Entuziasma disĉiplo de Francisco Ferrer (fama anarkisto, ekzekutita en 1909), Berthelot aktive simpatiis la katalunan naciistan movadon.

Komence de 1906 Berthelot definitive forlasis Francion por iri al Ĝenevo, laŭdire, por helpi la preparadon de la 2a Universala Kongreso de Esperanto, sed, pli probable, por spiri la por li pli "puran" aeron de neŭtrala lando. Li tie eldonis "rondirantan folieton por kreado de tutmonda *Socia Revuo*". Tri el la kvar numeroj li redaktis. La "folieto" fariĝis *Internacia Socia Revuo*, kiu ekaperis en 1907 kiel la unua klasbatala revuo en Esperanto. Dum la 2a Universala Kongreso Berthelot aranĝis la unuan kongreson de "verdruĝuloj". Post la kongreso li vojaĝis al Portugalio kaj poste al Argentino kaj Urugvajo, por fine ekloĝi en Brazilo.

En Goias (Brazilo) Berthelot provis starigi diversnaci-an komunisman komunumon, sed la entrepreno baldaŭ fiaskis. Persekutata de la aŭtoritatoj, perfidita de siaj kunuloj, priŝtelita kaj ĉifonvestita, grave malsana pro ftizo, eksciinte pri ekzisto de katolika misio de francaj dominikanoj en la brazila ĝangalo, Berthelot pene vojaĝis tien.

En majo 1910, li kuraĝis frapi ĉe la pordo de la misiistoj petante loĝadon por la "kelkaj vivotagoj, kiuj restis al li".

Perdinte la katolikan kredon jam en 1900, dum sia studado en Parizo, frate akceptita de la dominikanoj, iom post iom Berthelot repiiĝis. Li konfesis "Ĉion de la vivo mi trinkis, englutis kaj vomis. Nun, nur nutras min la riĉenhava lakto de la katolika doktrino".

Malgraŭ siaj gravaj psikaj kaj fizikaj suferoj, Berthelot ankaŭ tie laboris por Esperanto kompilante kun la dominikanoj la unuan gramatikon en la latina lingvo "Compendium grammaticae Esperanto", kiu neniam aperis. Al la dominikanoj li diris: "Kiam vi anoncos mian morton, diru al ili (la esperantistoj), ke mi multe laboris."

Piece pasiginte siajn lastajn monatojn, la 2an de novembro 1910, Berthelot mortis ĉe la dominikanoj en la misio de Conceição do Araguaia (Brazilo) "kiel vera kristano, kvazaŭ sanktulece".

Sian veran identecon li ĉiam volis kaŝi²⁾ kaj al la dominikanoj li kutimis diri: "Antaŭ ol morti, mi rivelos al vi kiu mi estas". Fakte, nur post anonco de lia morto al la franca ambasado, la dominikanoj eksciis, ke li estis filo de Paul Bert.

Ni klopodu nun ĵeti iom pli da lumo al Berthelot kiel esperantisto kaj al lia aktiveco en la Esperanto-movado. Post brilaj studoj en la liceo de Reims, Berthelot daŭrigis la studadon en Parizo. Tie profesoritis pri matematiko la fame konata gvidanto de la Esperanto-movado Carlo Bourlet. Jen kiel en *La Revuo*, n-ro 8(56) de aprilo 1911, estis resumita per la plumo de Bourlet la forta personeco de Berthelot:

"Kiam, en oktobro 1901, mi revenis al mia klaso, mi kun plezuro ekvidis sur la unua benko mian junan samideanon. Malofte, dum mia jam longa profesorado, mi renkontis junulon pli intelligentan, sed ankaŭ pli fantazian. Li kun mirinda facileco lernis matematikon kaj cetere ĉion, kion li volis lerni. Sed li nur lernis tion, kio al li plaĉis, kaj neniu forto en la mondo, neniu rezono estus povinta lin devigi studi ion, eĉ ne-

1) "La Homo Libera en Nacio Libera" de Marcelo Verema en *Internacia Socia Revuo*, de januaro 1908, represita en *Espero Pacifista* de marto/junio 1908.

2) Kiam li plenigis la demandaron por esti membro de la Lingva Komitato, kiel naskiĝdaton li eĉ skribis: Majo 1882. Li estis nomita membro de la Lingva Komitato en julio 1909.

La unua numero de "Esperanto", aperinta dimanĉon, la 18an de junio 1905: Nun, sepdek jarojn pli poste, "Esperanto" estas la plej vaste legata periodaĵo en la Internacia Lingvo.



cesegan, kio lin ne allogis. En julio 1902 li prezentiĝis al la ekzameno por eniro en la Politeknikan Lernejon. Mi tre esperis, ke malgraŭ sia neregula laborado, li tamen, pro siaj grandaj kapabloj en matematiko, estos akceptita. Li senpene transpaŝis la unuan parton, sed dum la dua fina parto, en la ĉefa ekzameno pri matematiko, li vigle kontraŭdiskutis sian ekzameniston. Li cetere estis prava kaj la ekzamenisto malprava. Tion malfacile oni pardonas al kandidato: Berthelot ne estis akceptita."

Varbita de samlerneĵano en la liceo de Reims, Berthelot esperantistiĝis en 1899 kaj ricevis la numeron 4874 en la *Adresaro de la esperantistoj* de d-ro Zamenhof. La lingvon li lernis ĝisfunde. Flame kaj entuziasme li propagandis ĝin.

Alveninte en Céret kaj dungiĝinte ĉe presisto, li tuj provis arigi la katalunajn esperantistojn, loĝantajn en la hispana kaj franca flankoj de Pireneoj, en unu sola kataluna asocio. En decembro 1904, li fondis la "Aplech Esperantista de Catalunya" (Kataluna Esperantista Grupo), kiu celis diskonigi Esperanton pere de la kataluna lingvo. Ĝia organo fariĝis *Espero de Katalunjo* (aperis nur kelkaj numeroj), presita de Berthelot mem, la unua Esperanta gazeto aperinta en la kataluna lingvo. Notinde estas, ke la unuan, plurpaĝan, ĉefartikolon verkis Salvador Dali, la patro de la nuntempe fame konata pentristo.

La unua ĝenerala kunveno de la grupo okazis en Barcelono la 24an de aprilo 1905. Krom diversaj delegitoj el ambaŭ flankoj de Pireneoj ĉeestis ankaŭ Emile Boirac, rektoro de la Universitato de Dijon, kiu poste, ĝis sia morto en 1917, estis prezidanto de la Akademio de Esperanto kaj de ĝia Lingva Komitato.

La 18an de junio 1905 Berthelot aperigis la unuan numeron de *Esperanto*, kies unua numero estis presita en Perpignan, sed la ceteraj, fare de Berthelot mem, en Céret. Duonmonata, kvarpaĝa (du en Esperanto kaj du en la franca lingvo), en formato 33x50cm, la revuo estis redaktata de Charles Lambert, universitata profesoro en Dijon; la administradon kaj presadon prizorgis Berthelot, ĝia proprietulo. La nova periodaĵo estis primovada kaj bone akceptita; ĝi estis ne nur abonebla sed ankaŭ "aĉetebla en ĉiuj francaj kaj svisaj stacidomoj". Jen letero de d-ro Zamenhof, presita en la dua numero de la nova gazeto:

"Kara Sinjoro, Mi ricevis la unuan numeron de Via gazeto 'Esperanto' kaj mi dankas Vin kore. Mi legis la numeron kun plezuro kaj granda intereso. Mi deziras al Via entrepreno la plej bonan sukceson. Via, L. Zamenhof".

En la sama — dua — numero de la gazeto, Berthelot ekpublikigis sian "Vortareto Esperanto-Esperanta", la unuan provon de vortaro tute en Esperanto.

Transloĝiĝinte al Genevo, Berthelot pene daŭrigis la eldonadon de la gazeto. Ĝi tiam estis presata en Bellegarde (Ain, Francio), sed, pro financoj, administraj malhelpoj kaj bojkotado, Berthelot cedis sian gazeton al Hector Hodler. La 12an de februaro 1907 reaperis *Esperanto*, kies nova direktoro estis Hodler. Por la unua fojo, krom kvarlingva ĉefartikolo, ĝi havis tekston tute en Esperanto — signo nekontestebla de ĝia jama universaleco.

Je la fondiĝo de UEA, en 1908, *Esperanto* fariĝis ĝia oficiala organo. Ŝuldaj ni estas al Paul Berthelot. Li meritis, ke ni pli bone konu liajn ĝis nun nedankitajn servojn por Esperanto.

Kromaj verkoj de Paul Berthelot:

- Vocabulaire français-espéranto* (kun Cart kaj Merckens), Paris 1903; kvarfoje reeldonita.
- Komercaj leteroj* (kun Lambert), Paris 1903; dufoje reeldonita.
- Fonetiko litera*³⁾ (pseŭdonimo Marcelo Verema), Céret 1904; reeldonita.
- Provo de khemia nomigado*³⁾, Céret 1904.
- L'évangile de l'heure* (la evangelio de la horo). Anarkista sloganaro. En 1912, do post la morto de Berthelot, tradukita en Esperanton de D. Ivanski kaj eldonita broŝurforme de *Internacia Socia Revuo*. El Esperanto tradukita japanen kaj ĉinen. Plurfoje reeldonita de japanaj anarkistoj kaj felietone ankaŭ en *La Voĉo de la Popolo*, ĉina Esperanto-periodaĵo, ekaperinta en 1913.
- Tradukaĵo: *Fantazio*, komedio en du aktoj de Musset. Post la morto de Berthelot omaĝe publikigita de Bourlet, unue en *La Revuo* kaj poste libroforme.

Por *Esperanto* kunlabore verkis Marcel Delcourt kaj Jean Amouroux

3) kun "reformita ortografio", skizo pri "kelkaj konsonantoy".

En kvin jaroj 33000 guldenoj

La kapitalo de Instituto Hodler 68 dum la pasinta jaro atingis la sumon de 175 000 guldenoj kaj tiel transformiĝis en la ĉefan mecenaton de la Movado. Kiel dum ĉiu el la lastaj kvin jaroj — ĉiufoje en junio — ankaŭ nun ni aperigas la decidon pri la ĉi-jaraj subvencioj, farante samtempe mallongan superrigardon pri la tuta periodo dum kiu la Instituto helpadis diversajn movadajn iniciatojn kaj entreprenojn.

JAM LA KVINAN JARON sinsekve la Instituto Hodler 68 el sia profito subvencias agadojn kaj organizaĵojn en la Esperanto-movado, kiujn la estraro de la Instituto (s-ro G. Maertens, d-ro W. Bormann kaj s-ro E. HaverSchmidt) konsideras pleje subtenindaj. La estraranoj de la instituto, al kiuj la Estraro de UEA ĵus renovigis la mandaton por plia periodo, en sia ĉi-jara kunsido, okazinta la 3an de majo 1975, diskutis pri la disdivido de la profito el la jaro 1974. Depreninte la sumon de 506,63 guldenoj por la riskorezerva fondaĵo de la Instituto, oni jene disdividis la restintan profiton de 6 700 guldenoj:

Fondaĵo Canuto: 2 300 gld. por 46 membroj-abonantoj de UEA, eksplicite el aziaj kaj afrikaj (kaj eventuale el sud-amerikaj) landoj en kiuj ne ekzistas organizita Esperanto-movado.

Akademio de Esperanto: 1 500 gld. por preparoj de la eldono de la dua kajero de *Aktoj de la Akademio*.

Eldonejo "Stafeto": 800 gld. por finpretigi la eldonon de la portugala eposo *Luzidoj*, kiu aperos en la prestiĝa serio "Oriento-Okcidento". La Instituto jam antaŭe (1972) subvenciis la saman projekton per 1 200 gld.

Portugala Esperanto-Asocio: 600 gld. por subteni la aktivecon de tiu reviviĝinta landa asocio, kies aktiveco dum multaj jaroj estis malpermesita.

Eŭropa Esperanto-Centro: 500 gld. por plurlingva informilo pri la Esperanto-instruado en Eŭropo.

Kastelo Grésillon: 500 gld. por helpi renovigon de la granda prelegejo en ĉi tiu internacie grava kultura centro de la francaj esperantistoj.

Skolta Esperanto-Ligo: 500 gld. por subteni ĝian ampleksan aktivecon en la kadro de la Monda Ĵamboreo en Norvegio.

Kompreneble, ankaŭ ĉi-jare la disponebla sumo ne sufiĉis por respondi al ĉiuj subvencipetoj: pluraj petintoj ricevis nenion, kaj aliaj devos kontentiĝi per sumoj multe malpli altaj ol petite.

Ĉar, kiel dirite, la disdivido de la subvencioj ĉi-jare okazis la kvinan fojon, tiuokaze ni faris malgrandan promenon tra niaj lastatempaj jarkolektoj, kun celo cifere resumi tiun kvinjaran periodon. Ni venis al interesaj konkludoj, kiujn ni notas ĉi-sube:

En la kvin jaroj, de 1971 ĝis 1975, Instituto Hodler 68 donacis al la Movado en la formo de subvencioj entute 33 150 guldenojn, kio laŭ la movadaj financaj

kriterioj sendube estas respektinda sumo. Kvankam siatempe fondita kun unuavica celo (kiun ĝi cetere notis ankaŭ en sia statuto) "disponigi financajn rimedojn al UEA", la Instituto nur en la unua jaro de la profitdivido (1971) donis sian tutan profiton de 5 650 gld. al UEA kaj ĝiaj fondaĵoj kaj agadoj (Fondaĵo Canuto, la Centra Oficejo, la revuo *LMLP*). Larĝe konceptante la sencon de "subvencioj al UEA", inkluzivante tie ankaŭ la subvenciojn al CED, al la preparata *Enciklopedio de Esperanto* kaj al *LMLP*, oni rimarkas, ke dum la lastaj kvar jaroj la subvencioj de la Instituto estis jene dividitaj: en 1972 al UEA iris 3 900, kaj al aliaj movadaj organizaĵoj kaj agadoj 3 600 guldenoj; en 1973 UEA ricevis 1 800, kaj la aliaj 4 000 guldenojn; en 1974 la Instituto helpis la agadon de UEA per 4 375, kaj la laboron de aliaj per 2 125 guldenoj; ĉi-jare UEA profitis 2 300, kaj la aliaj 4 400 guldenojn. En la kvin jaroj, UEA entute ricevis 18 025, kaj la aliaj 15 125 guldenojn.

Farante ĉi tiujn esplorojn estis interese konstati, ke Fondaĵo Canuto, tiu daŭra monumento al la homa solidareco interne de la Esperanto-movado, estis la sola konstanta favorato de la Instituto dum ĉiuj kvin profitaj jaroj. En tiu periodo al la Fondaĵo iris entute 9 700 guldenoj, sed la efiko de tiuj subvencioj variis de jaro al jaro: en 1971 el la subvencio de 2 400 gld. (la plej alta donaco al la Fondaĵo) oni povis membrigi 80 personojn, dum en ĉi tiu jaro la sumo de 2 300 gld. sufiĉas nur por 46 membroj-abonantoj. Tra la jaroj, la aliaj du plej grandaj profitintoj de la subvencioj estis la Akademio de Esperanto (3 500 gld.) kaj la revuo *LMLP* (3 150 gld.).

Instituto Hodler 68, kies kapitalo ankaŭ dum la pasinta jaro kreskis (interalie anonima donaco el Belgio de 3 350 gld. kaj la unua parto de la grandanima donaco de la familio Minnaja, pri kio ni skribis en nia marta numero, p.46), verŝajne ne atingos baldaŭ la celitan duonmilionon da guldenoj, sed ĝi jam nun atingis la sumon de 175 000 guldenoj, el kio pli ol triono estas donacoj. Ĉio ĉi estas admirinda rezulto, kiu sekvis el la iniciato de f-ino M.H. Vermaas, kiu ankoraŭ funkcias kiel la administranto de la Instituto. Ne nepre necesas donaci al la Instituto, oni povas disponigi al ĝi ankaŭ prunton de difinita sumo, kun aŭ sen rento. Pliajn detalojn bv. peti de: F-ino M. H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70 II R, Rotterdam 3002, Nederlando.

Kongreso kun faka akcento

KUN 675 PARTOPRENINTOJ el 20 landoj, la 27a Kongreso de Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF), okazinta inter la 10a kaj la 16a de majo 1975 en Villach (Aŭstrio), viciĝis inter la plej grandajn movadajn aranĝojn de ĉi tiu jaro. Ĝuste tiel konvenas al la plej granda faka asocio en la Esperanto-movado (IFEF havas preskaŭ 3 000 membrojn). La Kongreso okazis sub la protekto de s-ro Erwin Lanc, federacia ministro pri trafiko de Aŭstrio, kaj la solenan inaŭguron, dimanĉon la 11an de majo en la moderna Kongresa Domo de Villach, ĉeestis multaj altrangaj gastoj, inter kiuj ankaŭ la urbestro de Villach ing. J. Resch, viclandestro E. Frühbauer (iama trafikministro de Aŭstrio), ing. F. Bachler nome de aŭstraj fervojoj kaj s-ro G. Gilles nome de FISAIC (internacia kultura organizaĵo de fervojistoj). Salutleterojn al la Kongreso sendis ankaŭ d-ro H. Kirchschläger, federacia prezidanto de Aŭstrio, federacia kanceliero d-ro B. Kreisky, la 1-a kaj la 3a prezidantoj de la Aŭstria Parlamento, s-roj Banya kaj Probst, la oficejo de la ĝenerala sekretario de UN d-ro K. Waldheim kaj pluraj aliaj altranguloj.

Post pluraj jaroj en kiuj tio ne okazis, ĉi-jare ankaŭ UEA, kies aliĝinta faka asocio IFEF estas, sendis sian reprezentanton al la Kongreso. Tio estis d-ro Peter Zlatnar, komitatano kaj antaŭe ankaŭ estrarano de la Asocio, kiu en sia salutparolado en Villach interalie diris:

”Konsiderante la fakton, ke fervojistoj-esperantistoj estas la plej forta faka organizaĵo en la Movado, lingve kaj fake preta labori en sia medio, rekonita kaj agnoskita grandparte de landaj fervojaj direktoj kaj plej larĝe subtenata de gekolegoj en fervojistaj sindikatoj, ĝuste via organizaĵo estas historie vokita transiri de propagando de Esperanto al organizita premo al la socio por konkreta enkonduko de Esperanto en la internacian trafikon, speciale en la plej populara — fervoja — trafiko, persona kaj vara.”

Kiel kutime ĉe IFEF, la Kongreso en Villach havis apartan fakan akcenton al kiu kontribuis ankaŭ la prelego de ing. F. Tschom ”La aŭtomobil-transportado tra la fervoja tunelo inter Salzburg kaj Karintio”. Dum la Kongreso, la antaŭaj prezidanto, s-ro K.G.J. de Jong, kaj kasisto, s-ro O. Walder, estis nomitaj honoraj membroj de IFEF. La nuna sekretariino de IFEF s-ino Elfriede Kruse estis distingita per ora medalo de FISAIC. Dank’ al bona gazetara servo, pluraj aŭstraj gazetoj amplekse raportis pri la evento, kion faris ankaŭ la radio kaj la televido. Dum unu el la ekskursoj, en la najbara urbeto Arnoldstein estis inaŭgurita Esperanto-strato. Oni decidis, ke la sekvontjara IFEF-kongreso okazu en Svedio.

LERNEJA AGADO EN FRANCIO:

Esperanto en lerneja programo

POST PLURJARAJ KLOPODOJ interesigi francajn parlamentanojn pri la leĝigo de la instruado de la Internacia Lingvo en Francio, tiu agado, en kiu gravan rolon ludis s-ro Gabriel Rougetet (membro de la grupo prizorganta la rilatojn inter UEA kaj Unesko), promesas bonajn rezultojn. Laŭ cirkulero, kiun komence de ĉi tiu monato al siaj aktivuloj dissendis Unuiĝo Franca por Esperanto, 107 deputitoj, apartenantaj ĉefe al la socialista kaj radikala partioj, faris leĝproponon al la Nacia Asembleo (490 deputitoj) pri la instruado de Esperanto.

La leĝpropono antaŭvidas la enkondukon de Esperanto kiel libervola studobjekto en la programojn de la duagrada lernejoj, kun eblecoj elekti ĉi tiun lingvon kiam kompetenta instruisto estas disponebla, kio validas ankaŭ rilate la ekzamenojn pri ĉi tiu studobjekto. La leĝpropono atentas ankaŭ la edukadon de kompetentaj instruantoj de Esperanto, kio — post transira periodo — estos kompetenteco de altlernejaj

institucioj. Dum tiu transira periodo la edukaj aŭtoritatoj kunlaboros kun la Franca Instituto de Esperanto, kiu ĝis nun organizis ekzamenojn kaj eldonis diplomojn.

La cirkulero de UFE mencias, ke s-ro Rougetet, lige al la leĝpropono, dissendis leterojn al 50 deputitoj, 40 senatanoj kaj 5 eksministroj, kiuj en siaj antaŭaj elpaŝoj montris simpatian al la Internacia Lingvo.



Parizo: Oni planas debati pri la instruado de Esperanto.

Sciencaj esploroj kiel bazo por postaj paŝoj

EN SOVETA UNIO jam de unu jaro ekzistas aktiva programo de esplorado kaj eldonado pri interlingvistiko. Baldaŭ la unuaj fruktoj de tiu programo komencos aperi en la formo de libroj. Temas pri la Problema Grupo pri Demandoj de Internacia Helplingvo, starigita de la Instituto de Lingvoscienco de la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio la 21an de majo 1974, post kiam la Prezidiumo de la Akademio petis esploron pri "la demando de helplingvo por internacia komunikado kaj la eblecoj de ties utiligo en la nunaj kondiĉoj". La Problema Grupo havas kiel membrojn ok lingvistojn. Inter ili estas d-ro M.I. Isaev kiel gvidanto kaj doktoriĝa kandidato S.N. Kuznecov kiel bibliografo.

La Problema Grupo havas la taskojn studi: 1) teoriajn problemojn de helplingvo ĝenerale, 2) la historion de la sintezado de planlingvoj, 3) la tipologion de planlingvoj, 4) la rolojn de aŭtonomiaj procezoj kaj konscia interveno en lingvaj evoluoj, kaj 5) la strukturon kaj funkciojn de Esperanto kiel helplingvo en internacia komunikado.

Inter la projektitaj libroj pri kiuj okupiĝas la Problema Grupo, la unua enhavos jenajn artikolojn: Antaŭparolo (V.N. Jarceva, direktoro de la Lingvosciencia Instituto de la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio), E.A. Bokarev kaj interlingvistiko (M.I. Isaev), La nunepoka stato de la problemo de internacia helplingvo — Faktoj pri Esperanto (E.A. Bokarev), Pri internacia lingvo de scienco (E.A. Bokarev), La problemo de artefarita lingvo por la internacia komunikado (M.I. Isaev), La artefaritaj lingvoj kiel interlingvistika problemo (V.P. Grigorjev), La homaro kaj la oceano de informado (D.L. Armand), Pri tipologia klasifo de internaciaj artefaritaj lingvoj (S.N. Kuznecov), Paziografioj (D. Blanke), La evoluo de Esperanto (N.F. Danovskij), El historio de interlingvistika pensado en Rusio — ĝis la 19a jarcento (A.D. Duliĉenko), Nekonata paĝo el la historio de la patrolanda interlingvistiko — 1925 (L.L. Vasilevskij), Artefarita lingvo Akciom Variant (D.C. Baev). Tiu ĉi volumo jam estas finredaktita kaj oni atendas ĝian aperon dum ĉi tiu jaro. La Grupo nun laboras super dua volumo de artikoloj, kiu verŝajne aperos dum la jaro 1976. Laŭ la laborplano de la Grupo, dum la sekvantaj tri-kvar jaroj oni ellaboros pli grandan kolektivan verkon "La problemo de artefarita helplingvo". Estas interese, ke oni planas eldoni ankaŭ lernolibron por la rusa lingvo en Esperanto.

Parolante pri metodologiaj problemoj de interlingvistiko, komence de aprilo ĉi-jare en Melnik (Ĉeĥoslovakio), d-ro Isaev skizis la ĝisnunan laboron de la Problema Grupo kaj en la fino de sia prelego diris ankaŭ jenon: "Ĉio ĉi, tamen, ne signifas, ke ni en Soveta Unio ne preparos science verkitajn dokumentojn por la superaj politikaj organoj. Mi deziris nur diri, ke komence ni estas okupitaj per sciencaj laboroj, kiuj estos ankaŭ bazo por similaj dokumentoj." Ĉu ĉi tiuj frazoj de d-ro Isaev, kiu estas prezidanto de la Esperanto-Komisiono de la Unuiĝo de Sovetaj Societoj por Kulturaj Rilatoj kun Eksterlando (kunordiga instanco de sovetaj esperantistoj), signifas, ke oni en Soveta Unio laboras super baldaŭa oficialigo de tutlanda Esperanto-organizaĵo? Ĉu oni eble planas oficialigon de la instruado de Esperanto? Ĉu oni celas vastigon de la uzo de Esperanto en tiu grandega lando? Respondojn al ĉi tiuj demandoj verŝajne necesos atendi kelkajn pliajn jarojn, sed jam nun estas klare, ke la nivelo sur kiu oni okupiĝas pri Esperanto en Soveta Unio kaj la maniero en kiu oni tion faras estas senprecedencaj kaj povus fariĝi mejloŝtono en la historio de la Internacia Lingvo.

Utilaj kontaktoj

KIEL NI JAM ANONCIS (v. la aprilan numeron, p.77), la aganta direktoro de CED, d-ro Jonathan Pool, vizitis Sovetan Union dum aprilo, en la kadro de programo de interŝanĝoj de la Akademio de Sciencoj de Soveta Unio kaj la Nacia Akademio de Sciencoj de Usono. Dum la vizito (celanta kontaktojn kun sociolingvistoj), d-ro Pool renkontiĝis kun pluraj esperantistoj en Moskvo kaj diskutis kun ili demandojn de komuna intereso. Krome, li partoprenis specialan kunsidon en la Domo de Amikeco, en kiu kelkaj gvidaj esperantistoj diskutis kun li la situacion de la Esperanto-movado en Soveta Unio, Usono kaj aliaj landoj. Dum tiu diskuto oni aparte traktis eblecojn de pli bonaj rilatoj inter sovetaj esperantistoj kaj UEA kaj inter sovetaj kaj usonaj esperantistoj. En la diskuto oni tuŝis ankaŭ la nunan staton kaj la estontecon de CED.

Inter la partoprenintoj de tiu diskuto estis prof. d-ro David Armand, vicprezidanto de la Komisiono por Eksterlandaj Ligoj de Sovetaj Esperantistoj, Anatolij Berjoza, sekretario de la Komisiono, Semjon Podkaminer, vicprezidanto de MEM kaj membro de la Leningrada Packomitato, Vladimir Samodaj, vicedaktoro de la araba sekcio de *Moskvaj Novaĵoj*, Aleksandr Ĥarkovskij, ĵurnalisto, Viktor Aroloviĉ, prezidanto de la Soveta Esperantista Junulara Movado (SEJM), Dmitrij Cibulevskij, la unua vicprezidanto kaj respondeculo pri eksterlandaj rilatoj de SEJM, kaj Anatol Gonĉarov, prezidanto de SEJM kaj gvidanto de ĝia Scienc-Teknika Fakto. D-ro M. I. Isaev, prezidanto de la Komisiono, ne povis ĉeesti pro malsano. Ĉiuj kontaktoj kun sovetaj esperantistoj estis amikaj, kaj iliaj atingoj estas imponaj, laŭ d-ro Pool.

Sufiĉas havi bonan volon

LA MOVADO en aziaj kaj afrikaj landoj ankoraŭ longe restos en embria stato, se la landoj en kiuj la Esperanto-movado estas almenaŭ relative forta ne subtenos la fortikigon de kelkaj jam ekzistantaj kaj kreon de novaj Esperanto-kernoj en la t.n. Tria Mondo. Tiu subteno, kompreneble, estas ankaŭ tasko de UEA kaj ĝia Propaganda Konto, kvankam la financaj ebloj de la monda organizaĵo ĝuste en la nuna momento ne povas kontentigi ĉiujn bezonojn en Azio kaj Afriko. Cetere, ne ĉiam temas pri mono kiel la plej bona helpmaniero, ofte informa kaj lerno-materialo pli bone trafas la celon. Kaj, pri tiaj materialoj — ĉar temas pri difinitaj naciaj lingvoj uzeblaj — la landaj asocioj havas pli simplajn akirvojojn, ol havas UEA.

Post la bela ekzemplo de la Germana Esperanto-Asocio, kiu donacis al la Fondaĵo Azio-Afriko de UEA la sumon de 518,11 guldenoj (v. nian aprilan numeron, p.79), nun ankaŭ la Brita Esperanto-Asocio faris belan geston de solidareco: ĝi decidis doni 30 kompletojn de la anglalingva eldono de *Esperanto programita* de


H. Behrmann. Tiu moderna instrumaterialo iros por subteni la aktivan Esperanto-grupon, kiu laboras en la suda Hindujo sub la gvido de s-ino Saranath.

UEA havas apartan komisiiton pri la agado en aziaj kaj afrikaj landoj. Tio estas d-ro Renato Corsetti (Via Strabone, 1, I-00176 Roma, Italujo), kiun oni bonvolu kontakti pri demandoj ligitaj al la helpo de la Movado en la landoj de la Tria Mondo. D-ro Corsetti estas en regula koresponda kontakto kun grupoj kaj unuopuloj en tiuj landoj kaj havas bonan superrigardon ankaŭ pri la plej konvena helpmaterialo. Kompreneble, se oni volas subteni la Movadon en aziaj kaj afrikaj landoj, eblas sian helpopretecon esprimi ankaŭ per monkontribuo al la Fondaĵo Azio-Afriko ĉe la Centra Oficejo de UEA.

La ekzemplo de la Brita Esperanto-Asocio montras, ke vere sufiĉas nur bona volo, se oni jam deziras helpi. BEA mem estas en financaj malfacilaĵoj kaj ĝi tute certe tre malfacile en la nuna momento povus rezigni pri kelkdeko da pundoj. Sed, ĉar ĝi volis helpi — ĝi trovis manieron ankaŭ fari tion. Estus interese esplori kiom da miloj da ekzempleroj de lerniloj kaj legaĵoj kuŝas ĉe diversaj Esperanto-organizaĵoj kaj unuopuloj sen ajna ŝanco elĉerpiĝi dum ĉi tiu jarcento. Ankaŭ tiu morta kapitalo povas efike stimuli la entuziasmon kaj laboron de izolitaj fervoruloj en la Tria Mondo.

INTERNACIA ESPERANTO-INSTITUTO:

Denove vigele



S-ro A. Breddels estas la animo de la Instituto.

IAM UNU EL LA PLEJ AKTIVAJ institucioj de la Movado — la Internacia Esperanto-Instituto en Hago, Nederlando — komencas denove aktive roli. Necesis plenaj du jaroj por inventarii la havaĵojn de la Instituto kaj rekapti fadenojn de ĝiaj iamaj aktivecoj. Efektive, jam en la pasinta jaro la Instituto realigis plurajn notindajn paŝojn: nederlandlingva eldono de la broŝuro de Mario Pei *Mondlingvo serĉata* kaj ĝia distribuo al ĉiuj parlamentanoj en Nederlando, organizo de seminario por Cseh-metodaj instruistoj, subteno al la nederlanda fondaĵo "Esperanto en la instruado", apogo de Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo, ktp.

Fine de aprilo ĉi-jare, la Instituto kompletigis sian estraron, kiu nun konsistas el s-roj HaverSchmidt, Breddels, van Woerden kaj Weber kaj s-inoj Schuwer, Stein kaj Guillaume (ĉiuj tri filinoj de ges-roj Isbrücker, kunfondintoj de la Instituto). La estraro traktis, interalie, la novan agadplanon de la Instituto. Unu el la ĉefaj karakterizoj de la nuna laboro estas klopodoj, ke la Instituto fariĝu iuspeca komuna hejmo de la nekutime multnombraj esperantistaj organizaĵoj aktivantaj en Nederlando. Ĉar tiu ideo renkontas nekomprenemon ĉe pluraj el la organizaĵoj, oni denove traktos ĝin en aŭtuno ĉi-jare. Pro la fakto, ke la Instituto estas unu el malmultaj institucioj de la Movado sen financaj problemoj, la estraro decidis ankaŭ ĉi-jare finance subteni kelkajn iniciatojn kaj entreprenojn. Tiel la Instituto subtenos per 1 000 guldenoj la projektatan kampanjon por pligrandigo de la individua membraro de UEA — pri kio ni skribas en la ĉefartikolo de ĉi tiu numero —, la klopodojn de kelkaj junuloj el Hago teknike prizorgi bultenon de TEJO (garantia sumo de 500 gld.), preparojn por la 3a sesio de la Someraj Universitataj Kursoj en Lieĝo (en 1976), la ĉi-jaran SAT-kongreson en Hago (garantia sumo de 500 gld.) kaj kelkajn aliajn entreprenojn kaj iniciatojn. Aparte estas menciinda la rolo de la Instituto rilate la ĵusan publikigon de la kolore ilustrita informa broŝuro *Nederlando koncize*, kiun dank' al insistaj klopodoj de s-ino Jenny Heetkamp-Senstius eldonis la Ministerio de Eksterlandaj aferoj en Hago. Tiun broŝuron la kongresanoj de Kopenhago verŝajne trovos en siaj dokumentujoj.



Hekla, unu el la plej famaj vulkanoj en la mondo, 1 491m super la marnivelo. La lasta erupcio de Hekla okazis en 1970.

POST DU JAROJ, UNIVERSALA KONGRESO EN REYKJAVÍK:

Islando – surpriza lando

ANTAŬ KELKAJ JAROJ mi havis la plezuron gvidi dum brila julia tago grupon de eksterlandaj esperantistoj tra parto de la suda Islando. Ni vizitis naturajn lokojn eksterordinarajn, iujn eĉ mondfamajn, kiel la varmajn ŝprucfontojn ĉe Haukadalur (Geysir kaj pliajn), la grandioze belan akvofalon Gullfoss (la ora akvofalo), rigardis en la malproksimo unu el la vastaj glaciejoj, Langjökull (longa glaciejo), blanke sunbrilegantan sub blua, vasta ĉielo, kion oni spertas nur en la klara, longdistance travidebla aero de la nordo. Pli proksime, sin levis alten super la ĉirkaŭaĵon la disfamega vulkano Hekla, ankoraŭ same aktiva (lasta erupcio en 1963) kiel en la antikva tempo; vastan valon ni traveturis, dike kovritan per cindro kaj pumiko ekpost la erupcio en 1104, kiu dezertigis la tiam tie florantan kamparon kun multaj bienoj; unu el la plej vizitindaj interesaĵoj tie estas la ruino de unu el la antikvaj biendomoj, kiun arkeologoj elfosis antaŭ jardekoj, mirinde konservita dum jarcentoj sub la cindra tavolo.

Ĉion ĉi, kaj multon alian eksterordinaran, nesperteban sur la kontinento de Eŭropo, tiu esperantista

grupo sepnacia travivis kun miro kaj ĝojo, — certe tamen diversmaniere: ekzemple, pleje frapis la nederlandanojn la vasteco de la neloĝataj spacoj — en Islando nur du homoj vivas meznombro sur ĉiu kvadrata kilometro.


Sed kio por mi mem estis la plej memorinda, la plej surpriza fakto pri la unika spertado, kiun Islando proponis al tiuj alilanduloj, sin rivelis en okazo ŝajne tute nesignifa, je la reveturo al Reykjavík. Ni jam forlasis la grandiozajn vidindaĵojn en la montaro kaj trovis nin sur la ŝoseo kondukanta tra la malpli alta landstreĉaĵo pli sude. La ŝoseo estis kovrita per ruĝa gruzo elŝovelita de la vojlaboristoj el vulkancindraj kojnaltaĵoj en la proksimaĵo — io sufiĉe ordinara en Islando, ĉar tia materialo ja kreas tre taŭgan protektan surfacon por la vojoj. Tial, kompreneble, mi persone rimarkis nenion neordinaran, sed ne tiel miaj kunvojaĝantoj: ili surprize kriopetis, ke la ŝoforo haltigu la aŭtobuson, elsaltis kaj komencis kolekti malpezajn, ruĝajn ŝtonerojn sur la vojrandoj, taŭge grandajn por la poŝoj aŭ la manportataj ujetoj. Rigardante ilian ”stran-



Godafoss — ”la akvofalo de la dioj”, en la norda Islando: Ĝian majeston belecon ĝis nun vidis nur okazaj privilegiitoj.

gecan” agadon mi subite ekkonsciis, kvazaŭ revelacie, la esencan valoron de la malsamaj fonoj ĉe homoj por la kvalito de iliaj travivaĵoj: por islandanoj la ĉiutage spertataj vulkandevenaj aperaĵoj restas alkutimaĵoj preskaŭ nerimarkataj (krom en kazoj de novaj erupcioj, kompreneble!), sed por la plej multaj eksterlandanoj, neniam spertintaj ion tian, eĉ pumika ŝtonero impresas fremde kaj atentokapte. Ankoraŭ mi freŝe memoras la ekzaltan elkrion de nia genia poetino Marjorie Boulton, kiam ni kune, en julio 1964, trairis unu el la plej belstrangaj lafejoj en la proksimaĵo de Reykjavík: ”Mi trovas min sur la luno!”

Mi rakontas pri tio ĉi por akcenti la unikecon de Islando, la elstarecon de ĝia naturo, kapablan kapti la ordinaran eŭropanon per rekta surprizo, kaj regali lin per spertoj, kiujn li ne facile forgesos. Tamen ne timu: la islanda naturo neniel estas tiel minaca kiel eventuale iuj kredus, erupcioj ja ne okazas ĉiutage, la glaciejoj plejparte situas en la neloĝata interno de la lando, malproksime de ĉia homloĝado (unu tamen estas videbla el Reykjavík, la belforma glacimonto Snaefellsjökull, praa vulkano, tra kies kratero malsupren la herooj en la fama rakonto de la franca verkisto Jules Verne iris en la internon de la Tero por reaperi sur la itala vulkaninsulo Stromboli!). La somera klimato estas modera, la vetero eble iom ŝanĝigema, sed preskaŭ neniam ekscesa; la aero estas pura kaj la akvo klara; la popolo estas gastama kaj alte civilizita. La ĉefurbo, Reykjavík kun la ĉirkaŭaj urbetoj kaj komunumoj, havas ĉirkaŭ 100 000 enloĝantojn; ĝi estas sufiĉe vastarea urbo kun ĉiuj modernaj komfortaĵoj, la domoj estas hejtataj per nature varma akvo el enteraj varmfontoj, eĉ la naĝejoj ĝuas el tiu natura riĉaĵo. Facile estas atingi preskaŭ ĉiujn vidindajn lokojn per aŭtobusoj aŭ aeroplanoj, sed fervojoj ne ekzistas. Por birdamantoj iuj lokoj estas veraj paradizoj, precipe la lago Mývatn en la norda parto, sed eĉ en la centro de la ĉefurbo mem estas



Skogafoss estas nur unu plia akvofalo kiam temas pri la islandanoj, kiuj jam delonge alkutimiĝis al la unikeco de siaj pejzaĝoj. Sed, la eksterlandaj vizitantoj de Islando ne ĉesas rave gapi antaŭ la potencimpresaj scenoj, kiujn al ili proponas la ekzotika naturo de Islando.

Kun siaj vulkanoj, glaciejoj, gejseroj kaj akvofaloj Islando estas lando inter fajro kaj glacio. Kvankam ĝiaj loĝantoj ĝuas altan vivnivelon, Islando ankoraŭ ne estas inundita per teknikaĵoj kaj surogatoj kaj la ĉefa impreso, kiun oni kunportas el ĉi tiu lando estas ĝiaj natureco kaj pureco.



lageto, kie neordinare multaj specoj de naĝbirdoj, precipe anasoj, estas observeblaj.


Natura vasto, libereca sento pro maldensa loĝateco, pureco de aero, akvo kaj tero, estas certe io elĝuebla de la grandurbanoj el la cetera mondo, alvenintaj Islandon. Sed oni ne forgesu, ke kulture la islanda popolo havas rimarkindan historion. En Islando la plej malnova parlamento en la mondo estis fondita, en la jaro 930, kiu dum jarcentoj funkciadis sub libera ĉielo mezsomere en la belega loko Thingvellir — la parlamentaj kampoj —, je 50-kilometra distanco de Reykjavík. La islandanoj parolas lingvon, kiu mal-multe ŝanĝiĝis dum la lastaj 1000 jaroj, kaj tial por multaj interesiĝantaj eksterlandanoj havas alloge arkai-kan karakteron, kvankam plenverve vivanta. Islanda-noj verkis elstaran literaturon en la frua mezepoko (la sagaojn) en **sia propra lingvo**, pli frue ol tiel faris la ceteraj eŭropaj nacioj, kiuj prefere uzis la latinan kiel skriblingvon. Tiun literaturon eĉ islandaj infanoj povas ankoraŭ facile legi sen klarigoj kaj komentarioj, ĉar la lingvo estas preskaŭ la sama nun kiel en la 12a kaj la 13a jarcentoj.

Dum jarcentoj la lando estis sub dana regado, sed en 1918 ĝi akiris politikan memstarecon sub la dana reĝo, kaj en 1944 ĝi estis proklamita respubliko. Edukado estas ĝenerala kaj altgrada, kaj la popolo traktute ĝuas altan vivnivelon, kvankam inflacio daŭre turmentas ĝian ekonomian vivon, — kiel cetere estas pli-malpli la kazo ankaŭ alilande en nia tempo, ĉu ne? Post du jaroj, en 1977, la Universala Kongreso de Esperanto okazos por la unua fojo en Reykjavík, la ĉefurbo de Islando. Kial ne "bati du muŝojn per unu bato" kiel konsilas islanda dirmaniero (kaj ja ankaŭ Zamenhofa!): partopreni la Kongreson kaj samtempe kaj poste konatiĝi kun unu el la plej interesaj landoj de la mondo, — lando neordinare riĉa je kontrastoj, lando, kiun eksterlandanoj en la lasta tempo finfine "eltrovis" kaj komencis vizitadi ĉiam pli multnombro por ĝui ion apartan, ion novan, ion diferencon. Estante je nur 2–3-hora flugdistanco de la eŭropa kontinento kaj je 5-hora flugdistanco de Nov-Jorko, Islando ne devus fortimigi iun per sia situo en la norda Atlantiko. Se vi zorge antaŭplanos kaj komencos baldaŭ ŝpareti monon por la vojaĝo, vi tre kredeble povos realigi tian viziton — viziton, kiu eble ĝuste por vi estas delonga revo.

Baldur Ragnarsson,
prezidanto de la LKK de la 62a UK

La tuta Islando estas nur unu granda "nacia parko" en kiu oni konservas kaj protektas la mirindaĵojn de la naturo. Ĝi estas lando en kiu oni nur aŭdas pri la mal-puriĝo de la atmosfero, sed tion la islandanoj mem ankoraŭ ne spertis kaj verŝajne longe ankoraŭ ne spertos. Sur la apuda foto: La akvofalo Skogafoss.





Kunfondinto de la Klubo en Prago

EN LA LISTO de gravaj datrevenoj, publikigita de Unesko, ĉi-jare troviĝas ankaŭ la glora ĉeĥa poeto Stanislav Kostka Neumann (1875-1947), kies centan naskiĝdatrevenon omaĝas en ĉi tiu monato la tuta kultura mondo. Ĉar Neumann estis ankaŭ esperantisto, ni notas lian jubileon helpe de materialo, kiun sendis al ni s-ro O. Kníchal el Prago.

En la revuo *Nova kulto*, kies redaktoro kaj eldonanto Neumann estis, aperis en majo 1901 recenzo pri la ĉeĥa Esperanto-lernolibro de Čejka, Bilík kaj Holub, kun rekomendo, ke oni lernu tiun ĉi "facilegan interkomprenilon" por pli facile kontakti kun eksterlando. En aparta Esperanta teksto, verkita verŝajne de Neumann mem, ni legas, ke "nia redakcio estas kom-

pleza liveri al ĉiuj alilandaj esperantistoj informojn pri ĉiuj bohemaj aferoj. . .".

Neumann estis kunfondinto kaj funkciulo de la Esperantista Klubo en Prago (1902) kaj ties unua dommastro. Pri lia esperantisteco atestas ankaŭ d-ro Stanislav Kamarýt, elstara figuro de la Esperanto-movado, skribante pri sia samklubano, ke "li regis la lingvon tiom, ke li povis kun verkisto K. Dostál-Lutinov ataki tiun ĉi per esperantlingvaj versoj".

En la verko de S.K. Neumann ĉeftrajtas profunda konvinko pri la unuaranga graveco de la internaciisma konscio, kies penetron en la ĉeĥa kulturo la poeto meritas. Ankaŭ tiu ĉi lia sinteno klare montras intiman ligon de Stanislav Kostka Neumann kun la ideo internacilingva.

STANISLAV KOSTKA NEUMANN:

Printempa anunciacio

(fragmento)

*Ho longe devis ni en sopireg' atendi
en de lumanta neĝ' nin alblovanta frid',
vivtagon volis ni nur por galant' forvendi,
sed nin per frida fulm' nur mokis neĝa rid'.*

*Ĝis venis ekdegel' kaj levis sin rivero,
teatron grandan nun prezentis la glaci';
kun ĝu' rigardis ni torenton en kolero,
adapti al printemp' nin jam preparis ni.*

*Sed marto pro envi' kun novaj neĝoj venis,
song' de galant-amas' sur ĉion metis sin;
tra blanka ĉi fabel', kies tener' katenis,
konfuzaj iris ni kun tristo en anim'.*

*Kaj neĝis falsa flor' dum ĉiu mart-mateno,
por spiti al la sun' venanta je l' tagmez';
palisoj en baril' kun neĝa diademo;
sed ni atendis nur je de l' neĝadoj ĉes'.*



*Ho longe devis ni en sopireg' atendi.
Hodiaŭ. . . l' atmosfer' aperta jen pordeg'
al freŝa, hela blu' de frumaten' por tenti,
tersinon tuŝis jam unua dolĉa vek'.*

El la poemaro *Libro de arbaroj, akvoj kaj deklivoj*
(1911) esperantigis

Jiří Kořínek

Novaj libroj de Schwartz

Recenzas Vilmos Benczik (Hungario):

Anni kaj Montmartre, romano, **La stranga butikio**, facilaj versaĵoj, **Verdkata testamento**, kabaredaj versoj, de Raymond Schwartz. Aabyhøj: Dansk Esperanto-Forlag, 1974 (represo en tri apartaj volumoj), 126, 124 kaj 121p. 20cm. Broŝ.

Ne, kara leganto, ne ektimu, la petolema Raymond Schwartz ne elpensis novan ŝercon, li ne revenis el la lando de Hadeso sub verda tuko por inciti ŝrikemajn damojn, kiel decus al esperantista fantomo: lia korpo forlasis nin antaŭ tri jaroj, bedaŭrinde por ĉiam. Simple temas pri tio, ke Dansk Esperanto-Forlag reprenis tri Schwatr-z-ajn verkojn, iam furorintajn. Kaj la epiteto **nova** tute ne estas eraro de la recenzanto: tiuj ĉi libroj fakte estas novaj por la granda plimulto de la nunaj esperantistoj, eĉ por tiuj, kiuj sincere strebis akiri gustumaĵojn el la fabela torto, kiun oni nomas **Esperanta kulturo**. Oni ne povas supertaksi la lastatempe ekfajrintan aktivecon sur la kampo de la reeldonado; eble la ofseta tekniko helpas al ni fine **samtempe** vidi sur la merkato ĉiujn niajn klasikaĵojn, kaj studemaj esperantistoj ne devos kontentiĝi je mencioj en diversaj manlibroj aŭ vagaj onidiroj. Tio helpas siavice ankaŭ en la revizio de nia sistemo de valoroj, kaj certe kondukos al diskrevo de pluraj malutilaj literaturaj legendoj.

La nun represitaj verkoj aperis unuafoje en 1926 (*Verdkata testamento*), 1930 (*Anni kaj Montmartre*) kaj en 1931 (*La stranga butikio*). Estas nepre interesa ludo demandi sin, ĉu tiuj verkoj vere vivas aŭ ili reeldoniĝis dank' al nura eldonista kaprico.

Nu, la materialo trovebla en *Verdkata testamento* apartenas al tiu kategorio de la vorta arto, kiu malmulte rezistas la tempon. La aludoj al siatempaj eventoj, nun jam nekonataj, certe sordinigas la ridon de la leganto. Por komparo mi trafolumis tiaman hungarlingvan kabaredan tekstolibron, kaj mi devis konstati, ke maksimume dekono el ĝia enhavo povis iel efiki al mi. Ĉe Schwartz tiu proporcio estis preskaŭ inversa, nome, nur dekono de la aperintaj pecoj perdis tute sian ĉarmon. Kial? Nu, Schwartz superas siajn tiamajn hungarajn kolegojn en du aferoj: unue, li regas sian verklingvon en vere **verkista**, krea grado, kaj due, preskaŭ ĉiu lia kabaredaĵo estas pli ol primoko de certa konkretaĵo, enhavas almenaŭ fajreron de io universale homa. La samaj kialoj savas por la nuntempo ankaŭ la ŝercajn poemojn de *La stranga butikio*.

Anni kaj Montmartre estas verko de alia speco. Tiu ĉi romaneto ne ligiĝas tiel strikte al la epoko, en kiu ĝi

estis verkita, tamen, ĝia freŝeco nepre estis multe pli saniga en 1930, ol nun. Ja naivulinoj, kiel Anni, ege maloftiĝis, almenaŭ ĉi tie, en Eŭropo, kaj la knabinoj de nia epoko havas nekompareble pli konkretan nocion pri la amo. Tamen, tiun ĉi svelte konstruitan romanon de Schwartz tute ne sursidis la polvo. Savas ĝin de tio la absoluta foresto de ĉia sentimentaleco, banala filozofio kaj alispecaj balastoj, kiuj tiel ofte grincigas la dentojn de esperantistaj legantoj.

Resume, per la apero de tiuj ĉi verkoj Schwartz kvazaŭ reviviĝis, ja legema esperantisto trovas nun **samtempe** ses literaturajn verkojn el lia plumo sur la merkato — krom la supre menciitaj, la ambician romanon *Kiel akvo de l' rivero*, *Vole... novele* kaj *Kun siaspeca spico!* Do, post la reeldono de la verkoj de Jean Forge, jam ni havas la plenan verkaron almenaŭ de du niaj granduloj je ĉies dispono. Ni esperu, ke nia **kultura** movado scios ĝuste taksi kaj profiti tiun eblecon.

Koncerne la teknikan kvaliton de la represaĵoj mi menciis nur tion, ke ili nepre superas la originalajn eldonojn. La pli granda formato kaj la bonkvalita neĝblanka papero kvazaŭ invitas al legado.

La iom tro koncizaj, tamen kompetentaj enkondukoj de R. Haupenthal helpas neorientitojn kaj — kontraste al aliaj represaĵoj sen tiaj antaŭvortoj — kvazaŭ simbolas la atenton de la nuntempo al la verkoj.

Prezo: 8,10 / 7,92 / 8,10 (por Nederlando 8,42 / 8,24 8,42) gld. plus sendokostoj 10%.

Por legantetoj

Recenzas Wouter F. Pilger (Nederlando):

Malbona lupo reenkarigiĝinta, de R. Jacintho. El la portugala trad. A.K. Afonso Costa. Rio de Janeiro: Federação Espírita Brasileira, 1974. 20p. Kolorilus. 22cm. Broŝ.

Plaĉe ilustrita infanlibreto, kiu komenciĝas, kie la kutima fabelo pri Ruĝĉapulino finiĝas. Droninte kun ventro ŝtonplena, Malbona Lupo vekiĝas en la Spirita Mondo. Tie Spiritoj, tre homecaj, asertas ke la lupo povas pliboniĝi. Ĝi ne kredas pri la ebleco, kaj do la Spiritoj antaŭmontras per *estonteco-vidilo* ĝiajn tri sekvontajn vivojn. En reenkarigiĝoj kiel luphundo, senrasa hundo kaj kareshundeto, la eklupo povas reamikiĝi al Ĉasisto, Avino kaj Ruĝĉapulino (ĉiloke nomata Ruĝa Ĉapeto). Vidinte la eblecojn, Lupo konsentas renaskiĝi.

Se vi akceptas reenkarigiĝon, almenaŭ en fabeloj, ĉi tio estas plaĉa libreto. Sed ne malpli moralisma ol la pekinaj infanlibroj... La libro, feliĉe, ne informas nin pri kia fia kreaĵo la lupo verŝajne estis en *antaŭa* vivo. Enestas kelkaj prezeraroj kaj dufoje *li* anstataŭ *ĝi*. Iuj tro malfacilaj vortoj bezonos klarigon por la legantetoj.

Prezo: 1,80 (por Nederlando 1,87) gld. plus sendokostoj 10%.

Brila rezonado

Recenzas Jonathan Pool (Kanado):

Lingvoj, gentoj kaj lingva politiko, de M. Duc Goninaz. Lieĝo: Someraj Universitataj Kursoj, 1974. 38p. 29cm Broŝ.

Tiu ĉi kursoteksto estas la plej scienca verko en Esperanto pri la koncerna temo. Nur manpleno da aliaj lingvoj posedas tiel utilajn enkondukojn. Duc Goninaz montras la komplikecon de la rilatoj inter lingvoj, etnoj, gentoj, nacioj, naciecoj kaj ŝtatoj. Li montras, ke ni kutime eĉ ne signifkonscie uzas tiujn terminojn. Li resumas la lingvajn situaciojn kaj la lingvopolitikojn de pluraj landoj kaj rilatigas naciajn kun internaciaj lingvoproblemoj kaj Esperanto. Plurilale la teksto bele komplementas la verkon *Esperanto en perspektivo*, tuŝante problemojn tie netraktitajn sed traktendajn.

Oni povas malkonsenti kun la aŭtoro en iuj lokoj. Kial ne ekzistas, krom Esperanto, aliaj lingvoj "libervole" elektataj (p.13)? Kelkaj asertoj pri Sovet-Unio bezonas pli da atestaĵoj por pruviĝi. Ekzemple, la demografiaj statistikoj nur parte indikas, ke la rusa "elpuŝas la naciajn lingvojn"; parte ŝajnas esti eĉ la malo. Kaj la aserto, ke "Preskaŭ ĉiuj sovetaĵoj estas dulingvaj", malĝustas: laŭ la lasta (1970) popolnombrado, nur 21,5% agnoskis region de dua soveta lingvo, kaj fremdaj lingvosocioj pliiĝis tion nur ete.

Tiuj kelkaj mankoj de kompleta ĝusteco tamen tute ne influas la ĝeneralan brilecon de la rezonado en tiu ĉi libreto. Se vi emas pensi profunde pri la fenomeno "lingvoproblemoj", legu ĝin.

Prezo: 9,30 (por Nederlando 9,67) gld. plus sendokostoj 10%.

Imitinda libro

Recenzas Geoffrey H. Sutton (Svedio):

Systematikken i esperanto, de Ib Schleicher. Kopenhago: Dana Esperanto-Asocio, 1974. 50p. 21cm. Broŝ. Ĉi tiu belaspekta malŝlosilo por danoj klarigas la bazan gramatikan strukturon de Esperanto. Ĝi traktas alfabeton kaj prononcon, gramatikajn finaĵojn, vortfaradon, elementan vorttrezoron, la frazon kaj stilon kaj estas aldonitaj tekstoj, klarigoj de gramatikaj terminoj kaj alfabeto indekso. Elementoj estas kaj laŭteme kaj indekse aranĝitaj.

Laŭ la dupaĝa informriĉa antaŭparolo, la 400 elementoj prezentitaj estas elektitaj surbaze de esploroj pri ofteco. Ĉi tio estas rekomendinda al ĉiuj verkantoj de elementaj lingvolerniloj. La celtrafaj klarigoj malkovras la erudicion de la verkinto, kiu prezentas la materialon laŭ modela maniero. Mi serĉadis ion vere kritikindan, sed ne sukcesis. Kelkaj vortoj, kiuj troviĝas en ekzemploj, ne troviĝas en la vortareto, ekz.

dana, ŝipo. Ĉi tio povas ĝeni iun, kiu ne sukcesis memori la ekzemplojn. La redono de farvel per adiaŭ nur formale ĝustas, sed laŭ uzo respondas al ĝis (revi-do), kiu ne estas donita, kvankam per la libreto analizebla. Trafis min unu detaleta en la tekstoekzemplo. Ŝajnas imitinda la uzo de la prepozicio de post **demandi: La aĉetanto demandis de li**, anstataŭ uzi al, kiel oni ofte kutimas.

La dana movado jam eldonis plurajn bonegajn informilojn. Jen venis ankoraŭ unu, espereble imitota ankaŭ ekster Danlando.

Prezo: 6,20 (por Nederlando 6,45) gld. plus 10% por la sendokostoj. (La prezo anoncita en la aprila numero, p. 71, estis erara kaj ni pardonpetas pro tio).

Laste aperis...

Danjo en Vjetnamio (1974). Saotume Katumoto. 46p. Trad. el la japana. Ilus. 18cm. Broŝ. 3,30 gld. Rakonto pri vjetnama knabino kaj ŝiaj suferoj en la vjetnama milito.

Fundamenta Vortaro-Radikaro (1975). Edward Ockey. 127p. Fotokopiita. 30cm. Bind. 5,60 gld. Indeksita listo de ĉiuj vortoj kaj radikoj en *Fundamento de Esperanto*, *Universala Vortaro* kaj *Ekzercaro*.

Malfermu vian Biblion (1975). E.Sundström, 24p. 14cm. 1,38 gld.

Merlo sur menhiro (1974). A. Goodheir. 58p. 20cm. Broŝ. 5,48 gld. Originala poezio.

Pollando — nombroj kaj faktoj (1974). M. Świdzińska, J. Maternicki, J. Grum. 76+32p. Kolorilus. 16cm. Broŝ. 1,50 gld. Informa broŝuro pri diversaj aspektoj de Pollando, inkluzive de 8-paĝa skizo pri la historio de la Esperanto-movado en tiu lando.

Por forviŝi la memoron pri ŝi (1974). Ueyama masao. 95p. 17cm. Broŝ. 7,20 gld. Originala poezio.

Pri la varmo (1974). M. Túma. 215p. Ofsetita manskribita teksto. Ilus. 21cm. Broŝ. 6,— gld. Fundamentaj konsideroj de la scienco pri la varmo.

Wir informieren, Deutsche Esperanto-Jugend (1975). 12p. Ilus. 21cm. 0,15 gld. Informa broŝuro pri la Internacia Lingvo kaj la Esperanto-movado.

Se vi mendas ĉe la **Libroservo de UEA** (Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando), bv. atenti, ke la Libroservo ne akceptas mendojn, kiuj ne atingas la minimuman mendosumon de 15,— guldenoj. Al la netaj prezoj de libroj sendotaj al adresoj en Nederlando aldoniĝas 4% kaj al tiuj de diskoj, insignoj k.s. 16% pro la enlanda imposto. Al ĉiuj netaj prezoj aldoniĝas 10% por la sendokostoj.

MINIMUME 3,— POR LA SENDOKOSTOJ

Ekde la 1-a de septembro 1975, la Libroservo de UEA komencos fakturi al siaj klientoj la minimuman sumon de la sendokostoj en la alteco de 3,— guldenoj. Tio ĉi koncernas nur la malgrandajn mendojn (inter 15,— kaj 30,— gld.), kiujn siatempe rilatis ankaŭ la starigo de la minimuma mendosumo de 15,— guldenoj.



60a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO, Kopenhago (Frederiksberg), 1975 07 26 – 08 02.

Konstanta adreso: Nieuwe Binnenweg 176,
Rotterdam-3002, Nederlando.


Adreso de la Loka Kongresa Komitato: Postboks
1503, DK-2700 Brønshøj, Danlando.

Unesko salutas la Kongreson

La unuan fojon de post la starigo de la konsultaj rilatoj inter Unesko – la organizaĵo de Unuigintaj Nacioj por edukado, scienco kaj kulturo – kaj Universala Esperanto-Asocio, la ĝenerala direktoro de Unesko sendis oficialan salutmesaĝon al la Universala Kongreso. En sia mesaĝo la ĝenerala direktoro, s-ro Amadou-Mahtar M'Bow, bonvenigas la agadon de UEA en la Internacia Jaro de la Virino kiel daŭrigon de la laboro, "kiun ili entreprenis por internacia kompreniĝo kaj interproksimigo de la popoloj". En la julia/aŭgusta numero de nia revuo vi trovos la tutan tekston de la mesaĝo, kiu kompreneble aperos ankaŭ en la Kongresa Libro.

Duobla urba akcepto

La du nomoj Frederiksberg kaj Kopenhago aperas en la titolo de la 60a Universala Kongreso, ĉar ĝi okazos en la sendependa komunumo Frederiksberg, kiu situas kiel insulo en la koro de la urbo Kopenhago. Nenio stranga, do, la informo, ke la kongresanojn akceptos kaj regalos samtempe du urbestroj en du urbodomoj: tiuj de Frederiksberg kaj de Kopenhago. Entute estos akceptitaj 1 100 kongresanoj.



Nova financa subteno al la 60a UK

La dana instruministerio, sekvante la ekzemplon de la fondaĵo Vendelbos Sociale Fond, decidis finance subteni la laboron de la 60a Universala Kongreso. Ĝi jam pagis al la Kongreso subvencion de 10 000 danaj kronoj (ĉ. 4 400 gld.).

Radio Kopenhago ĉiutage

Dum la Universala Kongreso, la loka radio-stacio Kopenhago, programo dua, je ondolongo 96,5 metroj, ĉiutage elsendos en Esperanto la plej freŝajn internaciajn novaĵojn por la kongresanoj. La elsendoj okazos je la 08.10 matene. Krome, okazos aparta elsendo pri la Kongreso en ĵaŭdo, la 24a de julio, sub la titolo "Babelturo en Kopenhago".

Kongresprogramo aperinta

Kiam ĉi tiu komunikilo atingos niajn legantojn, jam estos dissendita la programkajero de la 60a UK kun ĉiuj detaloj pri la alveno en Kopenhago, veturo al la hoteloj kaj kongresejo, mapoj kaj tabeloj pri la programeroj. La 112-paĝa ilustrita Kongresa Libro estos distribuita en la kongresejo mem.

Infana internacieco

La internacia lernejo en Hellerup estas jam plena. Post nur kelkaj semajnoj ekregos tie tute speciala etoso, kiam la Internacia Infana Kongreseto revenos post preskaŭ 20 jaroj al la loko, kie ĝi komenciĝis en 1956. Pro spacomanko en la lernejo estis eble akcepti nur 25 infanojn, sed kompanse la konsisto de la kongreseto estas vere internacia: ĉeestos 2 britaj, 4 danaj, 4 francaj, 6 germanaj, 3 hungaraj, 2 italaj, 2 nederlandaj kaj 2 svedaj infanoj.

Ankaŭ italoj karavanas

Lastmomente aldoniĝis al la listo de almenaŭ 8 karavanoj, kiuj baldaŭ direktiĝos al Kopenhago, 11-taga itala aŭtobusa karavano de la 24a de julio ĝis la 3a de aŭgusto. La tuta kosto de la vojaĝo estas 85 000 liroj. Detalojn donas Federico Gialanzè, Bergama Esperanto-Grupo "Johano la 23a", Via Noli 19, I-24100 Bergamo.

Ankoraŭ eblas aliĝi al la jubilea Kongreso!

Malgraŭ la forpaso de unu limdato post alia, ankoraŭ restas ebleco aliĝi al la 60a UK, eĉ pagante surloke en Kopenhago la aliĝkotizon. Tamen, por mendo de loĝejo estas konsilinde ne plu prokrasti. Ĝis la finredakto de ĉi tiu numero de la revuo aliĝis ĉ. 1 100 personoj, kiuj certe ĝuos freŝprograman kongreson en la mirinda ĉefurbo de Danlando.

TEJO kaj Unesko

KIAM ni en la maja numero de nia revuo (p.81 kaj 82) raportis pri novaĵoj en la kampo de la eksteraj rilatoj de UEA, ni preteratentis gravan informon, kiu koncernas la rilatojn inter Unesko kaj UEA. Nome, krom la renkontiĝoj, kiujn la prezidanto de UEA havis en Parizo komence de aprilo, kaj pri kiuj ni raportis, okazis tiam ankaŭ aparta interparolo kun s-ro Viktor Kuzmin, respondeculo de la Junulara Fakto de Unesko. Tiun renkontiĝon ĉeestis ankaŭ s-ino Jeanne-Marie Liouville-Cash, kasistino de Tejo kaj samtempe membro de la teamo, kiu nun prizorgas la rilatojn inter Unesko kaj UEA. Jen la temoj, kiujn oni traktis dum la interparolo:

Laŭ cirkulero de Unesko, kun dato de marto 1975, ties Programo kaj Buĝeto por 1975/76 "antaŭvidas pli proksiman kunlaboron inter Unesko kaj junularaj kaj studentaj neregistaraj organizaĵoj (NROj)". Unesko "helpas al junularaj kaj studentaj NROj en la okazigo de kunsidoj aŭ en la plenumo de projektoj kongruaj kun la programo de Unesko." Prioritaton oni donos al:

- Agado por paco, internacia kompreniĝo kaj solidareco kontraŭ rasismo kaj ĉiuj formoj de agresado; por studoj pri la aktualaj junularaj opinioj kaj aktivecoj ligitaj al tiuj temoj;

- Agado por antaŭenigi la junularajn rajtojn;
- Kreo de kondiĉoj por pligrandigi la influon kaj socian rolon de la junularo;
- Edukado de la junularo por respondecaj roloj en la socio;
- Kontribuo de la junularo al la renovigo kaj evoluigo de la kulturo.

Proponojn pri la bezonata helpo de Unesko neces liveri al la pariza sidejo de la organizaĵo antaŭ la 30a de septembro 1975, pri iniciatoj realigitaj en 1976.

La menciitan kunsidon oni aranĝis ĉefe por pridiskuti ĉi tiun subvenciprogramon de Unesko, pri kies administrado respondecas s-ro Kuzmin. Siaflanke, la prezidanto de UEA atentigis, ke UEA havas fortan junularan sektion, kiu en si mem reprezentas signifan forton utiligeblan de Unesko por enketoj, realigo de kampanjoj ktp. D-ro Tonkin kritike rimarkis, ke Unesko ĝenerale ne eluzas la potencialon de la NROj por la propraj celoj, kiuj ofte tute kongruas kun tiuj de NROj. Li promesis aranĝi, ke la Junulara Fakto de Unesko ricevu pli regulajn informojn pri TEJO, aldone al *NNN* (bulteno de TEJO), kiun s-ro Kuzmin jam konis.

S-ro Kuzmin klarigis, ke la disponebla mono estas malgranda, sed, ke li tamen pretas akcepti kaj konsideri proponon de UEA/TEJO. S-ino Liouville-Cash tiucele renkontiĝos kun s-ro Kuzmin ankoraŭfoje por pripaŝoli la prezentatan proponon kaj konsideri eblajn variantojn kaj alternativojn de ĝi.

Ĉi tiu renkontiĝo havas apartan signifon, ĉar ĝi vastigas la rilatojn inter Unesko kaj UEA ankaŭ al la junulara kampo, kion oni antaŭe en tia grado eĉ ne provis fari.

Kio okazis kun „Kontakto” ?

KONTAKTO, la kaprica sed prestiĝa revuo de TEJO, kiu sian popularecon certe ne gajnis per regula aperado, estas temo de multaj demandoj, kiujn oni ne scias al kiu starigi. La abonantoj por ĉi tiu jaro ricevis ankoraŭ nenion, dum oni al la mendintoj de la pasintjara kolekto daŭre ŝuldas la lastan numeron por 1974. Io tamen estas komunikebla:

Numero kvar por la pasinta jaro devus aperi antaŭ la 31a IJK en Fredericia. Tiu numero estas la lasta, kiun prizorgas la nunaj redaktoroj de la revuo, kiuj jam en aŭgusto pasintjare informis la Estraron de TEJO pri sia retiriĝo. Tiu demisio (kiun oni neniel ligu al aliaj demisioj kaj eksigoj en tiu periodo de la pasinta jaro) kreis iom da paniko en la TEJO-rondoj, kie oni post plurmonata serĉado, ŝajne, sukcesis trovi novan redaktoron de la revuo: s-ro Giorgio Silber, la nuna ĉefredaktoro de la itala periodaĵo *Literatura Foiro*.

Kiam do aperos la numeroj de la jarkolekto 1975? Estas malfacile respondi la demandon, des pli, ke ĝi implicas ankaŭ la magran financon situation de la revuo. Povus okazi — tio verŝajne estus la plej bona

solvo —, ke *Kontakto* tute ne aperos en ĉi tiu jaro. Ĝi jam paŭzas kaj oni oficialigu tiun paŭzon. La akceptitaj abonoj por 1975 validu por 1976, la nova redaktoro bone pristudu la situation, varbu kunlaborantojn, faru necesajn antaŭpreparojn kaj — komence de 1976 ekaperu nova serio de la ĝisdatigita revuo de TEJO.

Interpretistoj

DUM TIU ĈI JARO la Komisiono por Eksteraj Rilatoj de TEJO (KER) organizas du seminariojn. En la kadro de la 31a Internacia Junulara Kongreso en Fredericia (Danlando) okazos la seminario "Lingvo kaj malkoloniigo". Ĝi estas precipe destinita al neesperantistaj partoprenantoj, kio necesigas la interpretadon en kelkajn lingvojn: dana, franca, Esperanto, germana kaj angla. Krome, inter la 5a kaj la 11a de oktobro 1975 okazos la dua ĉi-jara seminario de KER en Coimbra (Portugalia), kies temo estos "La rolo de la lingvo kaj kulturo en politika subpremado". Estas bezonataj pluraj interpretistoj por ĉi tiuj lingvoj: portugala, franca, angla kaj Esperanto. Al kompetentaj kandidatoj por la interpretista rolo KER (Kastelenstr. 231, Amsterdam) pagos la restadon dum la seminarioj en Danlando kaj Portugalio kaj duonon de la vojaĝelspezoj.

Islando

- La decido de la Estraro de UEA, ke la 62a UK en 1977 okazu en la islanda ĉefurbo Reykjavík jam montras vigligan influon al la islanda Esperanto-movado. Kvankam fondita en 1949, Federacio de Islandaj Esperantistoj ne aktivis dum pluraj lastaj jaroj. Komence de junio ĉi-jare, en la Esperanto-societo de Reykjavík "Aŭroro" okazis refondiĝo de la landa organizaĵo, kiu nun nomiĝas Islanda Esperanto-Asocio. La 8an de junio estis elektita nova estraro de IEA, kies prezidanto fariĝis s-ro Baldur Ragnarsson kaj sekretario s-ro Olafur S. Magnússon. Tuj kiam finiĝos formalizaĵoj pri la jura personeco de la nova organizaĵo, ĝi petos aliĝon al UEA.


Hispanio

- Centro de Esperanto en la urbo Sabadell, kiu en la pasintjara aŭtuno iniciatis monokolektan kampanjon por subteni la financojn de UEA, sukcesis kolekti 5 575 pesetojn (ĉ. 250,— gld.) kaj transpagis tiun sumon al la ĉefdelegito de UEA en Hispanio.

- En la ĉeesto de 200 gastoj, meze de majo, en Sabadell estis transdonita unuafoje la premio "Klara Silbernik", kiun iniciatis la Hispana Esperanto-Muzeo. La gajninto de la unua medalo estas s-ino Antonia Galvany



de Criach (sur la foto). Dum la sama festo oni transdonis honoran medalon al s-ino Teresa Massana de Hernández, kaj f-ino Silvia Martínez parolis pri la temo "Esperanto kaj la virino".



Finnlando

- Esperanto-Asocio de Finnlando havos sian ĉi-jaran aŭtunan kunvenon la 27an kaj la 28an de septembro en Kuhmo, kiu situas en la pitoreska (v. la foton) orienta regiono. Dum la aranĝo oni planas prezenti la teatraĵon *La fianĉiĝo* de A. Kivi. Al Kuhmo venos ankaŭ la prezidanto de UEA d-ro H.R. Tonkin, kiu en tiu periodo faros mallongan prelegvojaĝon tra Finnlando kaj Svedio. Detalojn pri la kunveno en Kuhmo bv. peti ĉe: s-ino Maija Tähkävouri, Kuusamon koulu, SF-88740 Härmänkylä, Finnlando.

Aŭstrio

- Graz en Aŭstrio kaj Triesto en Italio estas ĝemelaj urboj, kiuj regule interŝanĝas vizitojn de kulturaj kaj artaj grupoj. Nun al tiu aktiveco komencas kontribui ankaŭ la Esperanto-grupoj de la du urboj. La 31an de majo kaj la 1-an de junio ĉi-jare, grupo de triestaj esperantistoj gastis en Graz kaj ĝuis bonan programon, kies preparon gvidis s-ro Jozef Eder. La grupo el Graz intencas viziti Trieston en septembro ĉi-jare, okaze de la 45a Itala Kongreso de Esperanto, kiu estos en tiu urbo.

Svedio

- TUFF estas loka grupo, kiu apartenas al la sveda pacasocio (Svenska Freds). Jam dum kelkaj jaroj la grupo havas interesajn kontaktojn kun hinda lernejo. Kredante, ke ankaŭ esperantistoj interesiĝos pri ĉi tiu agado, TUFF (Box 58, S-135 01 Tyresö) tradukis ankaŭ en Esperanton sian faldfolion "TUFF kaj Sarvodaja Aŝram", kiu estas havebla ankaŭ ĉe la ĵus fondita Esperanto-klubo de Tyresö (Luin, Myggdalsvägen 123, S-135 00 Tyresö).

Japanio

- Inter la 27a de majo kaj la 29a de julio ĉi-jare, Japana Esperanto-Instituto organizas superajn Esperanto-kursojn en la klasĉambro de sia tokia sidejo. La kursoj, kies celo estas altigi la lingvan nivelon kaj organizan kapablon de japanaj esperantistoj, enhavas 19 prelegojn, kiuj traktas temojn pri la lingvo, literaturo, historio de la Movado, ĵurnalismo, instruado ktp.

- Fine de majo ĉi-jare, incendio en najbara domo larĝiĝis ankaŭ al la sidejo de "Rondo Harmonia", unu el la plej aktivaj Esperanto-grupoj en Japanio. En la fajrego malaperis ankaŭ parto de la grupa arkivo kaj novaj, ankoraŭ ne traktitaj korespondadoj. La grupo tamen daŭrigas sian aktivecon kaj la preparojn por sia dua kongreso, kiu okazos inter la 25a kaj la 27a de julio en Kioto.

Kolombio

- Fine de majo, en la universitata kaj industria urbo Medellín fondiĝis Antiokia Esperanto-Ligo, kiu celas kunordigi la agadon de pluraj Esperanto-grupoj, kiuj funkcias ĉefe en la urbaj altlernejoj, pri kio ni jam plurfoje raportis. La prezidanto de la nova organizaĵo fariĝis prof. d-ro Manuel Angel, kaj la sekretario s-ro Luis Guillermo Restrepo. Estas interese, ke la nova organizaĵo jam anoncas la unuan kongreson de kolombiaj esperantistoj, kiu devus okazi en Medellín fine de 1976.

Francio

- 80 partoprenintoj el 8 landoj venis al Bulonjo-sur-Marco komence de majo por marki la 70an datrevenon de la Unua Universala Kongreso de Esperanto en 1905. La programo enhavis ankaŭ akcepton en la urbo-domo kaj ekspozicion pri la Internacia Lingvo. La regiona gazetaro amplekse kaj favore raportis pri la renkontiĝo.

- La filmo "La mago de Toruń", kiu pere de infanaj desegnaĵoj, kolektitaj helpe de Esperanto, rakontas pri la vivo de Kopernik, havis grandan sukceson en Francio. Entute, tiu filmo de I. Flaczynski kaj P. Vincent estis prezentita 33 fojojn pere de diversaj elsendiloj de la franca televido. Ankaŭ la pola televido interesiĝas pri aĉeto de tiu filmo, kiu tre bone reliefigas la rolon de Esperanto en internaciaj kontaktoj.

Pollando

- La loka filio de PEA en Koszalin aranĝis meze de majo ekspozicion de Esperantaj eldonaĵoj en la kadro de granda ĝenerala kampanjo "Tagoj de kleriga libro kaj gazetaro". Komence de majo, la grupon vizitis la vicprezidanto de UEA d-ro W. Bornmann, kiu kun sia edzino tiutempe restadis en la regiono.

Aŭstralio

- Post multaj klöpodoj, d-ro Tim Einihovici, fakdelegito de UEA en Perth, sukcesis interesigi lokajn lernejojn pri la instruado de Esperanto kiel nedeviga studobjekto. La pasintjara programon, kiun prezentis lernantoj de Esperanto, ĉeestis preskaŭ 300 personoj. Por ebligi, ke la lernantoj ankaŭ praktiku la lingvon, kiun ili lernas, ges-roj Einihovici antaŭ nelonge iniciatis la fondon de junulara Esperanto-klubo, kiu kunvenas monate kaj havas plurdekon da membroj. Pri la fondiĝo de la klubo favore raportis la loka gazetar, skribante ĝenerale pri Esperanto.

Bulgario

- Ĉe la kulturdomo en la urbo Targoviŝte funkcias "Interklubo", kies celo estas pere de la Internacia Lingvo helpi starigon de profesiaj kontaktoj kun eksterlando. La membroj de la klubo apartenas al diversaj profesioj kaj oni povas kontakti ilin skribante al: Sindikata Kulturdomo, "Interklubo", Targoviŝte, Bulgario.

Fake

Tradukoj

- Laŭ la maja numero de *Ponto*, informilo de Tokia Esperanto-Klubo, ĵus aperis japana eldono de la vjetnama novelaro *La horloĝisto de Djen Bjen Fu*, kiun el Esperanto en la japanan tradukis membroj de Esperanto-grupo en Kanazaŭa. Temas pri la sama grupo, kiu antaŭe tradukis la alian vjetnaman novelaron — *La bambufluto* — uzante Esperanton kiel ponto-lingvon.

Prelegoj

- S-ro Bernard Golden, usona arkeologo nun vivanta en Hungario, en majo prelegis al la esperantistoj de la hungara urbo Győr pri "La problemoj de nuntempa Afriko". S-ro Gol-

den dum pluraj jaroj laboris en afrikaj landoj.

- En aprilo ĉi-jare, s-ro Giorgio Silfer, ĉefredaktoro de *Literatura Foiro*, faris unusemajnan prelegvojaĝon tra Hungario. La temo de liaj prelegoj estis la arto de Mikelanĝelo, la genia renesanca skulptisto, pentristo, poeto kaj arkitekto, kies 500-jaran datrevenon de la naskiĝo oni festas dum ĉi tiu jaro.

Televido

- La franca nacia televido (3a kanalo) elsendis la 5an de majo literaturan programon pri Esperanto. En la elsendo, kiu daŭris 15 minutojn, partoprenis s-roj R. Bernard, J.A. Rousseau kaj kelkaj alilandaj esperantistoj. Oni ne nur parolis pri la Esperanta literaturo, sed ankaŭ deklamis kaj legis fragmentojn.

Persone

Sartre

- Demandita antaŭ nelonge pri Esperanto, la fama franca filozofo kaj verkisto J.P. Sartre (lia romano *La naŭzo* aperis ankaŭ en la Internacia Lingvo kaj almenaŭ du el liaj teatraĵoj estis luditaj dum la Universitaj Kongresoj) interalie diris: "Mi aprobas la klopodojn pri internacia lingvo . . . , kondiĉe, ke tiu lingvo ne mortigu la naciajn lingvojn kaj kulturojn."

Setälä

- Spite al sia aĝo (en aprilo li fariĝis 84-jara), mag. Vilho Setälä, honora membro de UEA, ankoraŭ ĉiam restas tre aktiva. Laŭ invito de scienca societo de la studentoj pri la finna lingvo en la Universitato de Helsinko, mag. Setälä fine de aprilo 1975 prelegis pri la strukturo de planlingvoj. Post la prelego antaŭ plurdeko da studentoj okazis diskuto kun pluraj demandoj ankaŭ pri Esperanto.

Tonkin

- Kiel anoncote en nia maja numero, p.98, la prezidanto de UEA pasigos la sekvantan akademian jaron ĉe la Oksforda Universitato en Britio. Lia nuna adreso en Usono provizore ĉesos validi la 1-an de julio ĉi-jare. Post la 60a UK en Kopenhago, lia adreso estos: H.R. Tonkin, 286 Iffley Road, Oxford, Britio.



Turismo

- Per la unua ĉi-jara "Internacia Esperanto-Buslinio", kiun aranĝas pola agentejo por junulara turismo "Juventur", la 28an de majo ekveturis el Pollando al Bulgario 46 polaj esperantistoj el la regiono apud la Balta Maro. Du grupojn po 23 personoj gvidas s-roj J. Wolak kaj M. Laba, kiu sendis al ni ĉi tiun foton.

Loorits

- S-ro Eino Loorits, fakdelegito de UEA en Hobart, Tasmanio (Aŭstralio), verŝajne estas unu el la plej malproksimaj partoprenantoj de la 60a UK en Kopenhago. Li kun sia edzino ekvojaĝis el Sidnejo jam fine de aprilo per la itala ŝipego "Galileo Galilei". S-ro Loorits ankaŭ survoje — temas pri vojaĝo ĉirkaŭ la mondo — faris propagandon pri Esperanto. Krom, ke pri la celo de lia vojaĝo estis informitaj ĉiuj pasaĝeroj (pere de surŝipe aperanta bulteno), en pluraj lokoj kie la ŝipego haltis, ges-roj Loorits sukcesis interesigi ĵurnalistojn pri sia vojaĝo. Ekzemple, en Papeto, Tahitio, almenaŭ tri gazetoj aperigis artikolojn pri Esperanto. S-ino M. Deschamps, UEA-membro en Tahitio, sukcesis aranĝi por s-ro Loorits ankaŭ radio-intervjuon kaj aperon en la loka televido.

De Kock

- La konata poeto kaj membro de la Akademio de Esperanto, Edwin de Kock, antaŭ kelka tempo magistriĝis en la Universitato de Port Elizabeth (Sud-Afriko) pri la afrikansa kaj nederlanda literaturoj. Mag. de Kock, kiu estas ankaŭ unu el la kunjuĝantoj en la Belartaj Konkursoj de UEA, jam sekvas dujaran kurson por doktoriĝi en la sama fako.

N-ro 490, 1975-04-30

SOCIETO ZAMENHOF 1975

SVED: 73 J. Lokna. HISP: 74 G. Flores Martin. SVED: 75 Märtha Andréasson. NORV: 76 O. Maeland. ITAL: 77 A. Lacalendola. BRIT: 78 J. Brownlee. SVED: 79 Harald Andersson; 80 Maja Ahlström; 81 Elna Jansson; 82 B. Lindström. FRG: 83 M. Schumacher; 84 W. v. Waldowski. NOV-ZEL: 85 V.R. Moore. NORV: 86 Agnete Anjer; 87 Ludvig Anjer; 88 Pepita de Caspary; 89 Kap. R. Bugge-Paulsen. NED: 90 C. Pot; 91 A. Woessink-Nagata; 92 E.J. Woessink. FRG: 93 Marie Laade. DANL: 94 Ib Schleicher. PORT: 95 Antonio Rodrigues Correia. US: 96 J. Tonkin. ARG: 97 Eduardo Alvarez Vazquez.

NOVAJ DELEGITOJ

Konforme al la artikolo 11 de la Ĝenerala Regularo de UEA ni publikigas ĉi-sube la nomojn de nove nomitaj delegitoj de UEA. Se ĝis la dato 1975-08-15 neniu membro pro grava kaŭzo protestos, la nomigo fariĝos valida.

FRG: Friedrich Teltz, FD Mannheim. HISP: Santiago Mulas Callego, D Gijon. HUNG: Béla Medgyes kaj József Náray, FDoj Budapeŝt; Ernő Csiszár, D kaj FD Várpalota. ITAL: Giorgio Légori, FD Verbania Intra. NED: Wim Jansen, FD Leiden. SVIS: Hans Kästli, FD Zürich.

NE PLU VALIDAS

(pro adresŝanĝoj aŭ aliaj kaŭzoj) la informoj pri la jenaj delegitoj en la Jarlibro 1975:

AŬSTRAL: Orange. BRIT: London, FD (medicino). DANL: Rønne. FINNL: Toijala. FRG: Oberhausen-Sterkrade; Solingen, D. KAN: Kamloops. PORT: Punta do Sol. SVED: Uppsala, FD (industrio). SVISL: Wil. URUGV: Montevideo, D kaj FD (filatelo).

DONACOJ 1975 (Gld.)

ASOCIA KAPITALO: Belgio: Germaine Wolff 1000,—. Sumo ĝisnuna 3389,50.

FONDAĴO AZIO-AFRIKO: Belgio: Germain Pirlot 48,14. Sumo ĝisnuna 591,89.

FONDAĴO CANUTO: Norvegio: Esperanto-Klubo Oslo 96,59. Sumo ĝisnuna 1455,73.

CED: Nederlando: Wim Jansen 11,12. Nov-Zelando: Nov-Zelanda Esperanto-Asocio 33,50. Sumo ĝisnuna 73,81.

ĜENERALA KASO: Anonime 10,—; Anonime 500,—. Japanio: Miyo Akazawa 19,—. Kanado: F. Dufour 8,01. FR Germanio: Werner Heinrich 500,—. Nederlando: Jan Th. de Goeij 7,20; ges-roj v.d. Spoel 100,—. Svedio: Åke Ericsson 36,61; Jonaton Lönn 9,15; Sven Möllestad 6,24. Usono: Michael W. Ham 41,79. Sumo ĝisnuna 2457,83.

PROPAGANDA KONTO: Usono: Ralph A. Lewin 58,88. Sumo ĝisnuna 78,19.

Al ĉiuj tre koran dankon. UEA

NOVA PERANTO EN ISRAELO

Kiel Peranto de UEA en Israelo ekfunkciis s-ro Adrian Kuppermann, Hariŝonim str. 17, Ramat-Gan (aŭ: POB 26014 Tel Aviv). Li transprenas la taskon de s-ro Israel Israeli, kiu post plurjara servo devis forlasi ĝin pro malbona vidpovo. La membroj de UEA en Israelo estas afable petataj de nun direkti ĉiujn kotizpagojn, donacojn, proponojn pri delegitiĝo k.s. al s-ro Kuppermann.

La nomigo de s-ro Kuppermann okazis interkonsente inter Esperanto-Ligo de Israelo kaj la direktoro de la C.O., konforme al la artikoloj 14 kaj 16 de la Ĝenerala Regularo. Esprimante al li niajn bondezirojn por sukcesa laboro, ni samtempe varme dankas al s-ro Israeli pro la servoj faritaj.

Aĉetebla impona biblioteko

UNIVERSALA EKSPOZICIO de Esperanto, kiu estis unuafoje montrita en Montevideo en la jaro 1954, havis poste kvar pliajn elmontrojn en sia tuteco (Strasburgo, Kopenhago, Majenco kaj Varsovio), el kiuj la lasta — tiu de Varsovio — okazis antaŭ 16 jaroj. Krom tio, parto de la ekspozicia materialo estis montrita kelkajn pliajn fojojn, i.a. en Jugoslavio, Nederlando kaj Norvegio.

Konsiderante, ke la interesiĝo pri la nuna formo de la Ekspozicio grave malkreskis, kion certe kaŭzis ne nur la grandega laboro necesa por prizorgi la elmontrojn de la materialo, sed ankaŭ la grandega kresko de la transportaj kostoj (ekz. se ni volus ĉi-jare aranĝi la Ekspozicion en Kopenhago, nur la transportokostoj estus ĉ. 1 000 guldenoj), jam dum pluraj jaroj oni kun intereso studis ideojn kaj eblecojn por krei novan, modernan, facile transporteblan kaj facile arangeblan ekspozicion. Efektive, temas pri kreo de ekspozicio, kiu ne estos unikaĵo, sed kiun oni "eldonos", kiu do estos aĉetebla je akceptebla prezo. Por akiri monrimedojn por la eldono de tiu nova ekspozicio, la Estraro de UEA decidis vendi la nunan kolekton de la Universala Ekspozicio.

Kvankam tiu decido estis farita jam en aŭgusto pasintjare, ni ne anoncis ĝin pli frue, ĉar unue necesis pretigi apartan katalogon de la Ekspozicio. Tiu 61-paĝa katalogo (kun la indikoj de la titolo, aŭtoro, eldonjaro kaj paĝnombro por ĉiu ero de la kolekto) estas en si mem interesa akiraĵo kaj oni povas mendi ĝin ĉe la C.O. de UEA kontraŭ 25,— gld.

Laŭ la katalogo, la Ekspozicio havas entute 3 027 librojn, broŝurojn kaj gramofondiskojn, plus granda kvanto da prospektoj kaj faldfolioj. Ne eblas aĉeti unuopajn erojn el la ekspozicia kolekto, kiu ja en si mem estas impona biblioteko, sed oni intencas vendi la tuton al unu aĉetonto. La Centra Oficejo de UEA, kie la kolekto troviĝas, jam ricevis oferton de biblioteko en Japanio transpreni la tutan kolekton kontraŭ pluraj miloj da guldenoj. Per ĉi tiu informo, la direktoro de la Centra Oficejo invitas ĉiujn interesiĝantojn pri la aĉeto de la ekspozicia kolekto sendi siajn ofertojn al la C.O. de UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando plej malfrue ĝis la 1-a de oktobro 1975. Kiam pasos tiu limdato, la Estraro traktos la ricevitaĵajn aĉetproponojn kaj decidus pri la plej favora oferto.

TARIFO: Ĉiu vorto kostas 0,60 gld. (1 int. resp. kup.). Pri la enhavo de la anoncetoj respondecas nur la anoncantoj.



30-jara ministro, gimnazia diplomito, antialkoholisto, fremdlingvamiko, pacifisto, deziras korespondi edziĝcele ankaŭ germane, angle kaj itale. Proponu min

naclingve; respondo honorvorte al ĉiu promesita: S-ro Johano Beleznaĵi, Gerecseszálló, H-2800 Tatabánya, Hungario.

Kio estas tutmondismo? Estas la agado de la mondcivitanoj, kiuj volas forigi de la mondo: internaciajn militojn, malsaton, socian maljuston, subpremon, ktp. Por atingi tiujn celojn ili proponas krei supernaciajn aŭtoritatojn, kapablajn solvi mondajn problemojn. Interesatoj, skribu al: Volpelière, 10, rue Servie, F-30000 Nîmes, Francujo.

La Biblio, ĉu vorto de Dio, ĉu vorto de homoj? Interesa libreto por 2 resp. kup. Al nepagipovaj senpage. Esperanto-Misio, S-694 02 Hallsberg, Svedio.

Atentu esperantistoj, ĉie en la mondo. Gotenburgo estas la dua urbo en Svedio post Stokholmo, la ĉefurbo. Ni deziras per Esperanto efektiviĝi ĝemeligon kun la dua urbo en ĉiu lando. Skribu kaj petu detalojn: INTER – Agadgrupo por Esperanto, Box 55028, S-400 53 Gotenburgo, Svedio.

NI AFABLE PETAS la membrojn laŭeble ne skribi al la Centra Oficejo dum la monatoj julio kaj aŭgusto, se ne temas pri urĝaj mendoj aŭ demandoj. En tiu periodo pluraj oficistoj aŭ libertempas aŭ havas urĝajn kongresajn taskojn.

Sendu malgrandan monbileton el via lando al: s-ro Jairo Rezende, Av. Minas Gerais 420, BR-35100 Gov. Valadares, Brazilo, kaj vi ricevos same.

Tutmonde korespondas: Alvacy Plauda, Poŝtkesto 182, BR-88800 Criciúma-SC, Brazilo.


Club Espérantiste de Saint-Etienne 42100, Bourse du Travail 104, Francio, CCP (Poŝtgironto) Lyon 2913-17, vendas silkajn portretojn de Zamenhof 9x13, arte teksitajn en la urbo mem; favora prezo: 6 francaj frankoj aŭ 5 respondkuponoj.

Vojaĝante al Ĉeĥoslovakio, Grekujo aŭ Jugoslavio, skribu jam sufiĉe frue al la Centra Oficejo de UEA por peti specialan cirkuleron kun utilaj informoj. Adreso: UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederl.

Okaze vizitu Finnlandon! Esperanto-Asocio de Finnlando konferencos en Kuhmo, meza Finnlando, la 27an kaj la 28an de septembro 1975. Alloga programo, interalie Esperanta teatraĵo *La fianĉiĝo*. Honora gasto: d-ro Tonkin, prezidanto de UEA. Unika natura ĉirkaŭaĵo. Alveno fluge aŭ trajne al Kajaani, de tie aŭtobuse al Kuhmo. Detale informas: s-ino Maija Tähkävouri, Kuusamon koulu, SF-88740 Härmänkylä, Finn.

Institucio Hodler '68 varme atendas vian subtenon, ĉu per prunto de minimume 1 000 gld., ĉu per donac(et)o. La institucio fondiĝis en 1968 por plisolidigi la financan bazon de UEA. Detale informas la administrantino: f-ino M.H. Vermaas, Nieuwe Binnenweg 70II R, Rotterdam-3002, Nederlando.

Gekorespondantojn mi serĉas kaj interŝanĝas poŝtmarkojn, unuataĝajn kovertojn kaj bildkartojn el ĉiuj landoj: s-ro Modolo Felice, Via Saccon, I-33070 Vigonovo (pn), Italio.



Du studentoj (19–17j.) dez koresp. kun la t.m. Skribu al: Luiz Carlos Machado kaj Daniel Alves, Caixa Postal 6594, São Paulo, Brazilo.

Korespondemuloj! Se vi publikigas korespondo-peton en nia revuo, kunsendu vian foton. Ĉiumonate la redakcio elektos kelkajn fotojn de korespondantoj-anoncantoj por senpaga aperigo apud la koncernaj pagitaj anoncetoj! Kaptu la okazon!

Helpemaj esperantistoj estas invitataj eltrovi ĉu ekzistas propralanda listo de asocioj por suferantoj diversmalsanaj. Ken Hadler, "Croft House", The Croft, Hastings, Sussex, Anglujo.

Ekslibrisojn kaj literaturon pri tiu arto: albumojn, katalogojn k.s. en kiu ajn lingvo interŝanĝas Metodi Panĉev, Persenk blok 16-II, Sofia 7, Bulgario.

Kutimiĝu al internacia parolmaniero per aŭdado de sonbendoj. La Magnetofona Servo de UEA (2040 Springbank Road, Mississauga, Ontario, Kanado) povas rekomendi al vi modelajn registraĵojn kaj sendi kontraŭ 1 respondkupono kompletan liston de siaj programoj.

Se vi serĉas seriozajn gekorespondantojn, ĉu individuajn, ĉu sur kolektiva bazo (ekz. por lernejo), turnu vin al la Koresponda Servo de UEA, adreso K.S.M., 12 Rue des Jacobins, F-63000 Clermont-FD, Francio, kiu peras adresojn laŭ la regularo en la Jarlibro.

12-jara denaska esperantistino deziras korespondi kun samaĝuloj tutmonde: Olja Paŝĉenko, Volkova 5a, kv. 89, SU-644064 Omsk, Sovet-Unio.

POSTKONGRESO 1975! Unika aranĝo inter oficiale ĝemelaj urboj – AARHUS, Danlando, de la 3a ĝis la 6a de aŭgusto, kaj GOTENBURGO, Svedio, de la 6a ĝis la 9a de aŭgusto. Petu informojn kaj turismajn prospektojn de la respektivaj adresoj: Postkongreso, Hørmarksalle 5, DK-8240 RISSKOV-Aarhus, Danlando / Postkongreso, Box 55028, S-400 53 GOTENBURGO, Svedio.

Skribante al UEA, oni bonvolu enmeti kelkajn uzitajn poŝtmarkojn en la koverton kaj afranki ĝin filatele, kio multe helpas al UEA finance. Dankon!

La legolibro, kiun ni plej

bezonis



Novspeca legolibro enhavanta 20 dialogojn kun 2000 konversaciaj frazoj, parolturnoj, demandoj kaj respondoj kaj kun 20 tutpaĝaj humuraj ilustraĵoj. La tekstoj estas laŭgrade aranĝitaj.



Verkita en simpla stilo por faciligi al novaj lernantoj paroli la Internacian Lingvon

141 pj.
Poŝformata (22 x 12 cm)



Verkis: Albert Lienhardt. Ilustris: Arfoll. Eldonis: Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam, 1973.


Prezo: 4,50 (por Nederlando 4,68) guldenoj, plus sendokostoj 10%. Rabato revendista: 33,3% ĉe mendo de minimume 3 ekzempleroj.

LIBROSERVO DE UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando


DELEGITOJ!

Ĉu la detaloj pri vi en la Jarlibro 1975 estas ĝustaj?

Eventualaj ŝanĝoj, aldonoj aŭ korektoj devas atingi la Centran Oficejon plej malfrue ĝis la 1-a de oktobro 1975 por certigi aperigon en la nova listo.



LA AKTUALECO DE LA JARLIBRO DEPENDAS DE ĈIU UNUOPA DELEGITO – DO, ANKAŬ DE VI MEM!



D-ro RUBÉN FELDMAN GONZALES (sur la foto) vizitos dum julio, aŭgusto kaj septembro 1977 la tutan Eŭropon kaj Japanion, kun la celo plifortigi la programon PASPORTA SERVO DE TEJO. Li ne intencas esti gasto ĉe familioj kaj tranoktos nur en hoteloj.

Vojaĝo povas okazi ankaŭ en septembro, oktobro kaj novembro 1977, se tio montriĝos pli konvena. Interesitaj organizaĵoj kaj unuopuloj bonvolu jam nun kontakti d-ron Feldman por pli bone plani la agadon kaj elprofiti la vojaĝon kaj eventualajn kundisojn.

D-ro Feldman planas viziti jenajn urbojn: Madrido, Barcelono, Romo(?), Parizo, Londono, Edinburgo(?),

Stokholmo, Berlino(?), Sofio, Prago, Kopenhago(?), Helsinki(?), Hamburgo, Budapeŝto(?), Milano(?), Beogrado, Roterdamo, Varsovio(?) kaj eble ankaŭ Tokio.

D-ro Feldman anticipe dankas ĉiujn sugestojn por ĉi tiu vojaĝo kaj por la plibonigo de la PASPORTA SERVO. Skribante, bv. mencii tagojn kaj horojn plej konvenajn por kunsidi, samkiel la daŭron de eventualaj kunsidoj. Tio helpos, ke la vojaĝplano fariĝu pli facila kaj pli celtrafa. Bonvolu skribi al:

D-ro Rubén Feldman Gonzales, WSH - Box 249, WARREN, PA 16365, Usono.

El 300 kompletoj restas nun (komence de majo 1975) ankoraŭ nur 45! Se vi do deziras havi la sesvoluman trezorejon de la Esperanta kulturo, — tiam necesas rapide decidiĝi.

♦♦♦ Al la lasta — sesa — volumo aldoniĝos kompleta indekso, tema kaj aŭtora, ellaborita de s-ino Maria Benczik.

♦♦♦ "Mi kore salutas vian intencon reeldoni 'Literaturan Mondon' en formo de ses binditaj volumoj. Tio ŝajnas al mi unu el la plej gravaj entreprenoj de la lasta jardeko, kaj kompreneble mi faros mian eblon kunhelpi laŭpove. . . Malgraŭ la fakto, ke mi posedas kompletan de la kajeroj de LM, ankaŭ mi volas aĉeti unu kompletan. William Auld

♦♦♦ Kopirajton ni ricevis de s-ro Bela Bercei, eldoninto de la 3a periodo, frato de V. Bleier.

♦♦♦ Sugestojn kaj helpon ni ricevis interalie de s-roj U. Lins, Mijake Ŝihej, R. Haupenthal, W. Harmon, Teo Jung, Miyamoto Masao, Torben Kehlet, UEA, IEMW kaj JEI.


♦♦♦ Monofero de 20 japanaj esperantistoj ebligis la eldonon.

♦♦♦ La motivo de la represo estis niaflanka konvinkiĝo, ke nia generacio ankoraŭ ne povas superi kvalite kaj kvante la epokon, precipe de la jaroj ĉ.1930, de Literatura Mondo.

Kooperativo por la represo de LM, Tokio

Mendu ĉe UEA, Nieuwe Binnenweg 176, Rotterdam-3002, Nederlando. Prezo: 300,— (por Nederlando 312,—) gld., plus sendokostoj 10%. Pagante per banko aldonu 5,— guldenojn.

LITERATURA MONDO



TRIA JARO, DEKA NUMERO, BUDAPEST OKTOBRO 1924
 REDAKTA KOMITATO: JULIO BAGHY, KOLOMANO DE KALOCCSI,
 PAULO DE LANGE, PAULO BALKANYI, PAULO FARSANTI, KARLO BODO
 ELDONAS: HUNGARA ESPERANTO INSTITUTO BUDAPEST VI, EÖTVÖS-UTCA 3



Jam 800 homoj posedas ĉi tiun trezorejon!

En mondo de nestabilaj valoroj, kie kvalito estas oferata al kvanto, maloftaj estas la aĉetaĵoj, kies valoro kreskas de jaro al jaro kaj kies apero videble ŝuldiĝas al grandega homa fortostreĉo. Sed tia estas la verko "Esperanto en Perspektivo": monumenta kompendio de la Esperantaj movado kaj kulturo tra 87-jara ekzistado — kaj, perspektive, en la estontecon. Sur ĝiaj 876 paĝoj troviĝas praktike ĉiuj scioj, kiujn povas bezoni la uzanto de la Internacia Lingvo, inkluzive de multaj faktoj neniam antaŭe publikigitaj.

Verkis Ivo Lapenna (ĉefred.), Ulrich Lins (red.) kaj Tazio Carlevaro. Eldonis UEA (Centro de Esploro kaj Dokumentado pri la Monda Lingvo-Problemo). 876p. 20,5 x 14 cm. 65 ilustraĵoj. 40 indeksopaĝoj. Prezo: 84,— gld. (por Nederlando 87,36 gld.) plus sendokostoj 10%. Ĉe la Libro servo de UEA.